

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

FRUKTODONA
PLENKUNSIDO

•
UNUA
RAPORTO

•
IMITINDA
VIVO


•
POEZIA
VESPERO

•
INTERNACIA
JUNULARA
SEMINARIO

•
PIF'86

•
FESTO
DE IEK

•
INTERNACIA
E-KVIZO



Plenkunsido pri E-instruado

La 18-an de oktobro 1986 en Sofio sukcese efektiviĝis tre grava arango de CE de BEA — plenkunsido dediĉita al aktualaj problemoj de la instrulaboro.

Ceestis multaj E-instruistoj el la tuta lando, reprezentantoj de la distrikta estraro, gastoj.

En la prezidantaro okupis lokojn Hristo Gorov — prezidanto de BEA, Angel Todorov — sekretario pri la instrulaboro ĉe CE de BEA kaj direktoro de IEK, Dimităr Papazov — ĝenerala sekretario de BEA, Marin Băcev — sekretario de la Instrukomisiono kaj ĉefmetodikisto de BEA, Violeta Musakova.

La laboron de la plenkunsido malfermis Hristo Gorov, kiu donis la parolon al la sekretario pri instrulaboro kaj direktoro de IEK Angel Todorov.

En la enkonduka parto de sia elĉerpa raporto pri la traktata temo Angel Todorov subtekstis, ke en la antaŭvespero de la 100-jara jubileo de Esperanto nian vojon difinas la decidoj de la XIII Kongreso de BKP kaj de la 41-a Kongreso de BEA. En la lumo de tiuj decidoj, plej gravaj taskoj de BEA estas: perfektigo de la metodoj de gvidado; konstantaj zorgoj por plialtigo de la lingva nivelo; serioza laboro por sukcesa flegado de novaj spertaj pedagogiaj kadroj; speciala atento al la laboro por enkonduko de Esperanto kiel regula lernobjekto en la lernejoj; edukado de la membroj de BEA kiel aktivaj pacbatalantoj, sinceraj patriotoj kaj internaciistoj.

La raportinto emfazis, ke en nia socialisma lando ekzistas bonaj kondiĉoj por Esperanta agado kaj nur de la esperantistoj mem dependas, ĉu tiu eblico estiĝos bela realaĵo.

Plue A. Todorov parolis pri rezultoj de la instrulaboro dum la lernojaro 1985-1986. En la tuta lando funkciis ĉirkaŭ 160 civitanaj kursoj, kiujn partoprenis pli ol 2000 personoj kaj 250 grupoj en lernejoj kun 3500 partoprenantoj.

Laŭ la rezultoj de instrulaboro la distrikto de Gabrovo estis unua en la lando. En urbo Gabrovo Esperanton oni instruis en 15 lernejo al 275 ĝelernantoj, en Sevlievo — en 5 lernejo al 96 ĝelernantoj; en Drjanovo — en 3 lernejo al 50 ĝelernantoj; en Trjavna — en 2 lernejo al 30 ĝelernantoj. En la distrikto funkciis ankaŭ 6 kursoj por civitanoj — ĝenerale 38 kursoj kun 646 partoprenantoj.

Bone pasis la instrulaboro en la distriktoj de Stara Zagora (26 kursoj kun 362 partoprenantoj, el ili 146 ĝelernantoj en 16 klasoj kaj 10 civitanaj kursoj); en la distrikto de Veliko Tŕrnovo (310 partoprenantoj en 23 kursoj, el kiuj 200 ĝelernantoj); en la distrikto de Razgrad (14 kursoj kun 241 partoprenantoj, el ili 101 ĝelernantoj); en la distrikto de Haskovo (13 kursoj kun 241 partoprenantoj); en la distrikto de Jambol (23 kursoj kun 298 partoprenantoj, el ili 142 ĝelernantoj en 8 lernejoj).

Sur unu el la frontaj lokoj en la lando estas la instrulaboro en la distrikto de Sofio — Esperanton oni instruis en 13 loĝlokoj, en kiuj estis organizitaj 32 kursoj.

En Sofio-urbo funkciis 24 kursoj kun 280 civitanoj; la lingvon lernis ankaŭ 310 ĝelernantoj en 15 grupoj kaj 61 studentoj en 3 kursoj.

Angel Todorov zorgoplene parolis pri la kvalito de E-instruado en lernejoj, difinante ĝin kiel nekontentiga; pri la lernejanaj E-kluboj kiel edukejo de novaj esperantistoj; pri la agado de la Scienc-Metodika Centro en Sofio (fondita de Mihail Elenov antaŭ kelkaj jaroj) kaj pri la ĉi-jare en Gabrovo fondita dua en la lando Scienc-Metodika Centro, kiu disvolvas certan agadon kaj ludas la rolon de intera ĉenero inter DE de BEA en Gabrovo kaj la Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigo en Gabrovo; pri funkcia en Sofia distrikto Metodika Unuiĝo pri Esperanto ĉe la Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigo. La parolinto atentigis, ke la Instrukomisiono rekomendas tiujn tre taŭgajn kaj utilajn formojn ankaŭ al la ceteraj distriktoj; estis

menciite ankaŭ pri la ekzistantaj Instruistaj Klubo, kies agado ne multe diferencas de tiu de la Scienc-Metodikaj Centroj; estis lanĉita la ideo, ke en ĉiu urbo oni organizu specialajn E-kursojn por junaj instruistoj-filologoj, kiuj, sendube, pli facile kaj pli bone ellernos Esperanton kaj kiuj profesie posedas la metodikon de fremdlingva instruado; pri paŝoj instrui Esperanton al studentoj ankaŭ en la Plovdiva Universitato; pri eventuala kunlaboro kun la Katedro de Sugestopedio de d-ro Lozanov en la Sofia Universitato (la celo estas preparo de E-lernolibro laŭ la sugestopedia metodo kaj de kvar E-instruistoj — specialistoj pri tiu ĉi metodo).

La raportinto turnis specialan atenton al la fakto, ke la Instrukomisiono lastatempe malatentas la tre utilan formon de foresta studado, dank' al kiu Esperanton povas lerni ankaŭ homoj en urboj kaj vilaĝoj, kie ne estas E-societoj; li aparte emfazis, ke la bulgaraj esperantistoj tre malbone parolas Esperanton kaj ke oni devas multe labori por ŝanĝi tiun aferstaton; parolis pri paŝoj faritaj kaj farendaj lige kun la enkonduko de modernaj metodoj de instruado;

Post la raporto, tre atente kaj kun streĉa intereso aŭskultita, komenciĝis tre vigla diskutado, ĉar ĉiuj konsciis, ke temas pri la sorto de la E-instruado en nia lando, t. e. pri la estonto de la movado mem.

Estis tralegitaj la ampleksaj kaj tre atentindaj opinioj de Cano Ignev, membro de la Buroo de BEA (forestanta). „Nun nia plej grava tasko — li skribis — estas krei generacion de esperantistoj, kiuj bone posedas kaj vaste aplikas la internacian lingvon Esperanto. Al tiu tasko estas subigitaj ĉiuj niaj ceteraj agadoj: organiza, propaganda, kultura-kleriga, financa. Ni bezonas ne adeptojn, sed verajn esperantistojn — laŭ la Statuto de BEA“. C. Ignev tute prave opinias necesa paroli pri revizio de la ekzistantaj lernolibroj, kiuj certe havas mankojn, se la rezultoj de instruado ne estas tre kontentigaj; pri bezono de unueca instrumentado; pri primitiveco de la kondiĉoj de instruado; pri kreo de pli fortaj stimuloj por interesiĝo pri Esperanto de la civitanoj; pri pli bona organizo kaj gvidado de la instrulaboro. Lige kun ĉio ĉi li faras multajn valorajn proponojn.

Eldirojn faris Maria Dimitrova, vicprezidantino pri la instrulaboro ĉe UE de BEA — Sofio (ŝi emfazis, ke dank' al la penadoj de UE la E-instruado en la ĉefurbo atingis seriozajn sukcesojn); Rumjana Janeva el Gabrovo (plene aprobante la konstatojn de Cano Ignev, ŝi atentigis, ke 20-taga kurso ne sufiĉas por preparo de taŭgaj E-instruistoj); la Instrukomisiono, pere de la Ministerio de Klerigo jam nepre devas per dokumento konfirmi la rajtojn de la E-instruistoj en lernejoj); Zahari Ivanov, instruitoro pri la instrulaboro ĉe DE de BEA — Sofio (IEK estiĝu skolo por preparo de instruistoj, kie estu invitataj mondfamaj lektoroj; oni studu la sperton pri E-instruado en Svislando kaj Jugoslavio); Georgi Mihalkov, ĉefo de la eldonagado ĉe BEA: Al la E-kursoj oni nepre konigu la historion de Esperanto; en la instruproceso oni uzu literaturajn materialojn, ĉar la lingvo vivas en la literaturo. Violin Oljanov, prezidanto de la Instrukomisiono ĉe CE de BEA atentigis, ke oni antaŭ ĉio devas zorgi pri pli bona organizo de la instrulaboro, kiu, laŭ lia opinio, estas subtakata. La instrulaboro estiĝu plej grava tasko de CE de BEA.

Post la traktadoj, kiujn partoprenis ankaŭ aliaj esperantistoj, estis tralegita Projekto decido pri la ĉefdirektoj de la estonta laboro en la sfero de E-instruado.

Tiu unua en sia speco plenkunsido faris profundan analizon de la instrulaboro en la kadroj de BEA, vidiĝis la kaŭzoj pri la allasitaj mankoj.

Ni esperu, ke ĝi estos la unua paŝo al kvalita salto por solvo de la kardinala problem — efektiva instruado kaj lernado de la internacia lingvo Esperanto.

Lidia RAEVA



UNUA RAPORTO

Dimităr PAPAŖOV,
ĝenerala sekretario de CE de BEA

Konforme al artikolo 26 en la Statuto de Bulgara Esperantista Asocio, la Burao de Centra Estraro de BEA, en sia kunsido okazinta la 22-an de septembro 1986, decidis okazigi de la 15-a de novembro ĝis la 15-a de decembro 1986 la jarkunvenojn de la E-grupoj, kaj de la 15-a de decembro 1986 ĝis la 15-a de februaro 1987 — la jarkunvenojn de la E-societoj.

La jarkunvenoj de la grupoj kaj la societoj okazos en atmosfero de ĝenerala laborimpeto por plenumo de la decidoj de XIII Kongreso de Bulgara Komunista Partio. Ili estos la plej grava evento en la vivo de BEA en la antaŭvespero de du gravaj por la bulgara E-movado eventoj — la 100-jariĝo de la internacia lingvo Esperanto kaj 80-jariĝo de BEA. La kunvenoj devas fari fundan analizon de la E-agado dum la raportata periodo, direktita al plenumo de la partiaj decidoj kaj de la decidoj de la 41-a Kongreso de BEA. En la materialoj de la jarkunvenoj oni devas pritrakti kaj mulfacete analizi la laboron de la grupoj kaj societoj por propagando de Esperanto inter la vasta publiko. . . Samtempe estas necese analizi la organizon de la instrulaboro ankaŭ surbaze de la decidoj de la plenkunsido de CE de BEA, okazinta la 18-an de oktobro 1986. La kontaktojn de esperantistoj el la grupoj kaj societoj kun eksterlandaj esperantistoj devas esti traktataj el vidpunkto de la praktika aplikado de Esperanto, precipe en entreprenaj societoj, kiuj devas ĉiamaniere helpi la laborkolektivojn en ilia ĉiutaga agado.

Al tiu problemo seriozan atenton devas turni antaŭ ĉio la profesiaj grupoj kaj societoj, unuigita en sekciojn, kiuj direktas ilian agadon en la socia vivo de la lando. Tiucele la profesiaj societoj kaj grupoj devas ricevi instrukciojn de la Sekcia Konsilantaro de BEA kaj de la koncernaj sekcioj kiel organizi sian pluan laboron, por ke ili povu preni ankaŭ praktikajn decidojn. Baza direkto de la materialoj kaj dis-

kutoj estu pliperfektigo de la kompleta organiza agado de la societoj kiel garantio por novaj sukcesoj.

La jarkunvenoj de la grupoj okazu ĉe jena tagordo:

1. Priagada raporto de la grupo
2. Akcepto de laborplano por la venonta periodo.
3. Elekto de nova estraro.

Dezirinde estas inviti al la jarkunvenoj de la lernejanaj grupoj reprezentantojn de lernejanaj komitatoj de la Komsomolo. En la preparlaboro devas aktive partopreni ankaŭ iliaj E-instruistoj. La lernejanaj grupoj elektas estraron el prezidanto, vicprezidanto, sekretario kaj membroj per publika voĉdonado. Samkonsistan estraron elektas ankaŭ la junularaj grupoj cele al perfektigo de la junaj aktivuloj en la organiza agado. La ceteraj grupoj laŭ profesioj kaj interesoj elektas per publika voĉdonado estraron kun grupa respondeculo. Pri la nombro kaj konsisto de la grupestraroj decidigas la jarkunveno. La Societa Estraro validigas la elekton de la grupa respondeculo kaj de la prezidanto de la junulara aŭ lernejana grupo.

La jarkunvenoj de la societoj okazu ĉe jena tagordo:

1. Raporto de la Societa Estraro pri la agado dum la pasinta periodo
2. Raporto de la Kontrola Komisiono
3. Pridiskuto kaj akcepto de projektodecidoj pri la agado dum la venonta periodo.
4. Elekto de novaj Societa Estraro kaj Kontrola Komisiono.

Delegitojn por la distriktaj jarkonferencoj oni ne elektos, ĉar ĵus antaŭ ili okazos ankoraŭfoje jarkunvenoj. Societoj, kiuj havas malpli ol 10 membroj elektos nur prezidanton kaj sekretariojn. La nombron de membroj kaj konsiston de la Societa Estraro difinas la jarkunveno.

La prezidanton de la societo oni elektas per publika voĉdonado. La vicprezidanton, sekretariojn kaj respondeculojn pri agadsektoroj oni elektos dum kunsido de la Societa Estraro. La voĉdonado por nova Societa Estraro laŭ decido de la kunveno okazas aparte por ĉiu kandidato, enskribita en la projektolisto de la nova estraro, aŭ grupe por la tuta Estraro. La elekton oni okazigas per publika voĉdonado. Post la elekto la Buroo de la koncerna Distrikta Estraro de BEA validigas la elekton de prezidanto kaj sekretario. Ĉar la jarkunvenojn oni organizos fine de la kurlanta kaj komence de la venonta jaro, tio devas okazi nur post pago de la membrokotizoj kaj post kiam tiuj lastaj estos transdonitaj al la koncernaj distriktaj estraroj kaj al la Centra Estraro de BEA. Societoj ĝis 10-membraĵ ne elektas kontrolan komisionon. La ceteraj societoj elektas kontrolan komisionon el prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario (eventuale ankaŭ membroj, kies nombron oni difinas laŭ decido de la kunveno). Pro tio ke la antaŭajn jarkunvenojn oni okazigas konforme al la malnova Statuto de BEA kaj ĉiuj societoj elektis kontrolajn komisionojn, nun la kontrolon faros ili. Se en iuj kontrolaj komisionoj estas el falintaj membroj, pro iu aŭ alia kaŭzo, ilin oni povas anstataŭigi per novaj (en antaŭa kunveno), por ke estu farita la necesa kontrolo.

Apartan atenton la Distriktaj Estraroj devas turni al la organizo de la jarkunvenoj. Por la celo necesas okazigi instrukciajn kunsidojn aŭ

renkontigojn kun la societaj prezidantoj aŭ sekretarioj. Oni faru planon por okazigo de la jarkunvenoj en la distrikta E-organizaĵo. Por doni helpon kaj efektiviĝi kontrolon, oni distribuu la membrojn de la Buroo aŭ de la distriktaj estraroj por respondi pri societaj kunvenoj. Post la kunveno la Distrikta Estraro devas informi CE de BEA pri la nivelo kaj pri la faritaj rekomendoj kaj proponoj. Apartan atenton oni turnu al la kadroj. La Buroo de la Distrikta Estraro devas anticipe pritrakti la konsiston de la novaj societaj estraroj kaj direkti al ili la plej spertajn kaj perspektivajn kadrojn.

Dezirinde estas okazigi la jarkunvenojn en solena atmosfero, por ke la societaj membroj sentu ilin kiel feston. Rekomendinde estas, ke oni skribu pri ili en la loka gazetaro. Tiel la publiko estos informita pri la utila agado, kiun realigas la E-societoj. Post la jarkunvenoj, konforme al la Statuto de BEA, jarkonferencoj de la distriktaj E-organizaĵoj ne okazos.

La antaŭstarantaj jarkunvenoj estas tre gravaj ankaŭ pro tio, ke ili estos unua raporto pri plenumo de la decidoj de 41-a Kongreso de BEA.

La Centra Estraro de BEA esprimas sian certecon, ke la membroj de la grupaj kaj societaj estraroj, la tuta asocia aktivularo maksimume klopodos kaj okazigos altnivele la jarkunvenojn, por ke dum la venonta raportperiodo la societoj kaj grupoj ankoraŭ pli sukcese laboru kaj transformu en farojn la decidojn de la XIII Kongreso de BKP.



ALTAJ DISTINGOJ

La Stata Soveto de Popola Respubliko Bulgario distingis la veteranon de la bulgara E-movado **GEORGI NIKOLOV DOLAPĈIEV** per ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — III grado, okaze de lia 80-jariĝo kaj pro lia aktiva socia agado.

La redakcia teamo de „Bulgara Esperantisto“ elkore gratulas la karan jubileulon kaj bondeziras al li fortan sanon kaj multjaran viglan aktivadon sur la Esperanto-kampo.

* * *

La Estraro de la Unuiĝo de Bulgaraj Journalistoj distingis nian estimatan kolegon kaj kamaradon **NIKOLA ALEKSIEV** per sia plej alta premio „Georgi Kirkov“ pro lia kompleta journalista aktivado kaj speciale pro liaj ĵus aperintaj libroj „Ruĝa torĉo“ kaj „La Internaciismo de Hristo Botev kaj nia nuntempo“.

La bulgaraj esperantistoj kaj la multnombraj eksterlandaj amikoj de Nikola Aleksiev varme gratulas lin pro la alta distingo kaj bondeziras al li multjaran viglan ĵurnalistan kaj porpacan agadon.



D-ro Vasil Vasilev estas naskita en la revolucia vilaĝo Batiŝnica, distrikto de Ruse. Lia avo pereis dum la Rusa-Turka Liberiga Milito kaj la patro — dum la Balkana Milito. Jam en la infanaĝo Vasil serĉis respondon al la demandoj kial ekzistas maljusta socio, kial en la mondo estas feliĉo kaj malfeliĉo, riĉeco kaj misero.

Kiel lernanto en fundamenta lernejo en la proksima vilaĝo (nun urbo) Dve Mogili li estis elektita prezidanto de la lerneja klubo de Ruĝa Kruco. Poste, kiel gimnaziano en urbo Bjala, li estis aktivulo de marksisma grupo kaj de la lerneja abstinencula societo.

En 1927 li daŭrigis la lernadon en Tria Sofia Knaba Gimnazio,

IMITINDA VIVO

VASIL VASILEV — 80-JARA

kie li ankaŭ aktivis en marksisma grupo kaj en la lerneja abstinencula societo „Izgrevo“ (Sunleviĝo) kaj fervore lernis Esperanton aŭtodidakte. Dum la sama jaro Vasilev iniciatis la fondon en sia vilaĝo de junulara abstinencula societo „Trezven Rabotnik“ („Sobra Laboristo“) kaj ankaŭ la unuan en la distrikto vilaĝan Esperanto-societon „Vilaĝa Voĉo“.

Komence de 1929 Vasilev estas studento en la Supera Kooperativa Lernejo en Sofio. Pro partopreno en la fondkongreso de la Komunista Junulara Asocio (RMS) en 1928 kaj pro lia aktiva kontraŭfaŝisma agado kiel studento, li estis kondamnita al 3-jara malliberigo. Post lia liberigo en oktobro 1931 Vasilev denove estas studento en la Sofia Universitato. Li aktive eklaboras en la Komunista Studenta Asocio (BONSS), kies ĉefsekretario li estis elektita de la dua asocia kongreso. La studento Vasilev estis unu el la iniciatintoj pri unuigo de la progresemaj studentaj fortoj en kontraŭfaŝisma studenta fronto, kune kun la studentaj organizoj de agraranoj, socialistoj kaj anarkistoj. Malagrablaĵoj ne malfruigis. La burĝa faŝisma universitata gvidantaro eksigis Vasilev el ĉiuj universitatoj de la lando kaj li estis denove kondamnita al malliberigo kaj ĵetita en malliberejon.

— Post mia liberigo — rememoras nun d-ro Vasilev — dank' al

amikoj-esperantistoj el Ĉeĥoslovakio mi daŭrigis mian studadon de veterinara medicino en Brno. Tie mi ankaŭ aktivadis en la studentaj komunistaj, esperantistaj kaj abstinenculaj organizoj.

Vasil Vasilev fine diplomigis kaj doktoriĝis en Vieno, en la jam okupita de hitler-faŝistaj trupoj Aŭstrio. Pro lia kontraŭfaŝisma agado en Vieno li estis sekrete observata de hitleraj SS-anoj.

Post la venko de la socialisma revolucio en Bulgario d-ro Vasilev arde kaj senripoze eklaboris por aktivigi la partian, esperantan kaj abstinenculan organizojn en v. Batiŝnica. Krome, li estas fondinto de la unua en la distrikto vilaĝa agrikultura kooperativo en 1945.

D-ro Vasilev partoprenis kelkajn universalajn Esperanto-kongresojn kaj preskaŭ ĉiujn naciajn E-kongresojn. En 1980 li estis honorita per la Ora Insigno de BEA. Kiel aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo li estas distingita per multaj ŝtataj ordenoj kaj medaloj.

Li aktivas ankaŭ en la Distrikta Societo de Filozofoj.

La esperantistoj el Ruse kaj la redakta komitato de „Bulgara Esperantisto“ adresas al d-ro Vasil Todorov Vasilev korajn salutojn okaze de lia 80-jara jubileo kaj bondeziras al li sanon kaj novajn sukcesojn en la esperantista kaj abstinencula movado en nia lando.

Jordan KALINOV

RENKONTIGO DE GENERACIOJ

Okaze de la Jaro de Paco, la 15-an de oktobro j.k. en la Domo de Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo en Sofio renkontiĝis multaj esperantistoj — reprezentantoj de ĉiuj generacioj: veteranoj, komsomolanoj, junpioniroj. . .

La festan kunvenon inaŭguris Dimităr Haĝiev, prezidanto de la bulgara MEM-sekcio. Li emfazis la gravan rolon de ĉiuj esperantistaj generacioj en la batalo por paca mondo, por mondo ne minacata de nuklea katastrofo.

Rememorojn rakontis la prezidanto de BEA Ĥristo Gorov kaj la E-veteranino Ivanka Spasova. La ĉeestantoj unuanime aprobis

telegramon al la soveta ambasadoro lige kun la novaj sovetaĵaj iniciatoj por konservo de la paco.

Sekvis riĉa kaj varia belarta programo, kiun partoprenis la Horo de Sofiaj Esperantistoj, la estrada kantistino Margarita Radinska, kvarteto „Orbita“, knabina kantgrupo el 8-a Sofia Mezlernejo, kantgrupo „Buntaj Kravatoj“ el Boĵuriŝte kaj multaj aliaj profesiaj kaj amatoraj aktoroj.

Tiu renkontiĝo ankoraŭfoje konfirmis la fortajn ligojn inter la esperantistaj generacioj kaj la kontinuecon de la progresemaj porpacaj ideoj de la kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof.

Veneta BALEVA

DEBUTO KAJ FINO DE VOLAPUKO EN BULGARIO (1886–1986)



Volapuko aperis publike en 1879-1880, sed en la unuaj kelkaj jaroj ĝi havis sukceson nur en Okcidenta Eŭropo¹. Apenaŭ post la unua kongreso de la volapukistoj (1884) Volapuko penetris en Orientan Eŭropon.

La unuan lernolibron por bulgaroj „Volapuko, sistemigita resumo pri la principoj de la Universala Lingvo“², aperigis Krestjo Ivanov Mirski en Varno, 1886, 32 paĝoj malgraŭ nd-formataj. Tiu lernolibro fakte prezentas nur kompendion de la gramatiko de Volapuko. Ĝi estas traduko el la ruslingva Volapuk-lernolibro, kompilita de nekonata rusa aŭtoro laŭ la kvina germanlingva eldono de J. M. Slajer. La ruslingva lernolibro estas eldonita en Moskvo, de la lernolibra magazeno „Unuagrada Lernejo“, apartenanta al E. N. Tiĥomirov. El la antaŭparolo de la unua bulgara Volapuk-lernolibro ni ekscias, ke la tradukinto K. I. Mirski pretigis ankaŭ Volapuk-bulgaran vortaron kun 3 000 vortoj³. Ĝis nun neniu ĝin vidis. Tre verŝajne ĝi restis nepresita, en manuskripto. K. Mirski estis elstara intelektulo kaj sociaganto en Varno. Antaŭ la fino de 19-a jarcento li mem aliĝis al la bulgara esperantista movado kaj en 1899 eldonis propagandan broŝuron pri Esperanto⁴.

La bulgara gazetaro rilatis favore al Volapuko. Ekz. revuo „Nova bălgarska pčela“⁵ („Nova Bulgara Abelo“), I, 12, novembro 1887 (Sofio) aperigis artikolon „Universala Lingvo“. En ĝi oni skizas la historion de la provoj krei internacian helplingvon kaj finas kun favoraj referencoj pri Volapuko. En n-ro 13 de la sama gazeto aperis daŭrigo sub titolo „Universala Lingvo Volapuko“⁶, en kiu estas donitaj sciindaj informoj pri la tiutempa disvastigo de Volapuko tra la mondo (pri Bulgario oni nenion mencias).

Tri jarojn post la apero de la unua Volapuk-lernolibro en Bulgario estis publikigita dua Volapuk-lernolibro sub titolo „Gramatiko de la Universala Lingvo Volapuko, Sofio, 1889“⁷. Aŭtoro de la verko estas J. M. Slajer. Sapu-nov faris la tradukon kaj ĝin eldonis kaj disvastigis. La libro havas 64 paĝojn, formato 16,5×12,5 cm. Ĝi estas la dua kaj lasta Volapuklernolibro eldonita por bulgaroj. Krom tio la sama tradukisto kompilis grandan Volapuk-bulgaran vortaron kun 14 000 vortoj⁸. El la longa artikolo-reklamo, kiu aperis en

gazeto „Zornica“⁹ („Venuso“), XIV, 41, 14-an de oktobro 1889, Konstantinoplo, ni ekscias, ke oni preparis eldonadon de Volapuk-gazeto por bulgaroj, sed ĝi ne realiĝis pro la fiasko en vastigo de tiu lingvo en Bulgario.

Paralele kun la disvastigo de Volapuko spon-tane aperis la unuaj adeptoj de tiu lingvo: en Varno (K. Mirski), en Veliko Târnovo (M. Seizov, kiu aperigis en gazeto „Trud“ „Laboro“¹⁰, somere de 1887 tradukitan artikolon pri Volapuko), en Samokov (fraŭlino Velika Ivanova), en Kjustendil (D. Delčev), en Bjala Slatina (Vasil Cv. Gaševski), en Orjaĥovo (Bohaček), en vilaĝo Drugan, apud Radomir (St. Dimitrov), en Sofio, Svištov, Batak, k. a.

Tiel aperis la ĝermo de la unua internaci-lingva movado en Bulgario, kiu pledis por enkonduko de artefarita lingvo (konkrete en tiu kazo — Volapuko) en la internaciaj kontaktojn (komercajn, kulturajn k. a.)

Tiu evidenta progreso de Volapuko en Bul-gario montriĝis efemera. La adeptoj ne sukcesis ellerni la lingvon. Ili estis nominalaj (teoriaj, ideaj) volapukistoj. Ne post longe Volapuko pereis, estante forlasita sen kompato de siaj unuaj plej adaj adeptoj. Tiuj aŭ konver-tiĝis al Esperanto aŭ malinteresiĝis plene pri Volapuko. Tamen la perejo de Volapuko ne estis tuja. Fakte ĝi estis formorto iom-post-ioma, ĉar laŭ rememoroj de malnovaj esperantistoj¹¹ estis disrevigitaj varbitoj en 1895, 1897. Iom poste, en 1901, Hristo T. Rjaĥovski aĉetis Volapuk-lernolibron. Rememorante pri tio li konfesas: „La bonega antaŭparolo pri tiu ĉi libreto kredigis min, ke la artefarita lingvo estas ebla. Tamen Volapuko restis por mi nur hieroglifaĵo de l'eŭropa homo“¹².

En Bulgario jam delonge ne ekzistas vola-pukistoj, tamen estas konservitaj deko da gramatikoj (lernolibroj) kaj preskaŭ tiom da vortaroj. Ilin konservis kaj pro memoro gardis tiuj bulgaraj esperantistoj, kiuj forlasis Volapukon kaj fariĝis fervoraj adeptoj de Esperanto. Ili ne hontis, ke ili estis volapukistoj. Ili fieris pri kono de la Volapuk-malfacilaĵoj el propra sperto, tial ili poste fariĝis esperantistoj.

Canko MURGIN

NOTOJ:

1. Murgin, Canko: *Historio de Bulgara Esperanto-Movado, kajero unua (1885-1890)*, Kokemäki, Finnlando, 1964.

2. Slajer, J. M.: *Volapuko, sistemigita resumo pri la principoj (fundamento) de Tutmonda Lingvo, (tra-*

dukis kaj) antaŭparolis K. Iv. Mirski, preseo H. N. Vojnikov, Varno, 1886.

3. Same, p. 4

4. Zamenhof, L. L.: Mallongaj Informoj pri la Internacia Lingvo „Esperanto“, (tradukis kaj) eldonis K. Iv. Mirski, preseo K. Nikolov, Varno, 1899, (bulgarlingva).

5. * * * Universala Lingvo, gazeto „Nova bulgarska pĉela, 1, 12, la 15-an de novembro 1887, Sofio.

6. * * * Universala Lingvo Volapuko, gazeto „Nova bulgarska pĉela“, 1, 13, la 15-an de januaro 1888, Sofio.

7. Ŝajer, J. M.: Gramatiko de la Universala Lingvo Volapuko, (tradukis kaj) eldonis Petro K. Sapunov, preseo K. T. Kuŝ(1)ev, (slogano) Unu Homaro — unu Lingvo!, Sofio, 1889, (bulgarlingva), 16,5×12,5 cm, p. 64

8. Ŝajer, J.M. Sapuncu, P.K.: Vortaro de la

Universala Lingvo Volapuko, ĉirkaŭ 14 000 vortoj, parto Volapuk-bulgara, (tradukis kaj) eldonis. Petro K. Sapunov, preseo K.T.Kuŝev, Sofio, 1889, 16,5×12,5 cm, p. 244.

9. Zornica (gazeto bulgarlingva), XIV, 41, 14-an de oktobro 1889, Konstantinoplo, Turkio.

10. * * * La Ideo pri la Universala Lingvo, p. 830-831, Trud, 1, 12-13, aŭgusto 1887, (tradukis Mihail B. Seizov), bulgarlingva, Veliko Tŕrnovo.

11. Rajĉev, Ilarion: Kiel mi estigis esperantisto, p. 9, Bulgara Esperantisto, XVII, 3-4, novembro-decembro 1935, Sofio.

Milĉev, Borislav: Ĉe la plej malnova esperantisto, p. 12-13, Bulgara Esperantisto, XVIII, 9-10, majo-junio 1937, Sofio.

12. Rjajovski, Ĥr.T.: Por Historio de Esperantismo, p. 97-101, Unua Paŝo, 1, 7, julio 1906, Sofio, p. 99.

Poezia vespero

La Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „Maksim Gorkij“ okazigis la 22-an de oktobro j. k. interesan iniciaton: vesperon dediĉitan al la verkaro de la poeto Ĥristo Gorov, elstara kreanto de originala Esperanta poezio.

Antaŭ plenplena salono kun esperantista publiko la literatura kritikisto Georgi Miĥalkov amplekse kaj brilstile prezentis en sia prelego la kreaĵojn de Ĥristo Gorov.

„Duonjarcenton Ĥristo Gorov versas en Esperanto — diris Miĥalkov. — Li apartenas al la rondo de tiuj Esperantaj poetoj, kiuj eĉ por momento ne perdis al la originala Esperanta literaturo, eĉ por momento ne forlasis ĝin.“

Emfazinte kelkajn gravajn periodojn en la malfacila vivo de la kreanto, Miĥalkov montris lian elkreskadon kiel Esperanta poeto, apogita de eminentaj Eldonistoj kiel Teo Jung kaj de la monda esperantista legataro. La preleganto detale traktis „Poemon de l'plugisto“, kiu kaŭzis vastan reĉon siatempe.

„Poemo de l'plugisto“ — li diris — estas verkita laŭ impresoj de la aŭtoro kaj laŭ rememoroj de esperantistoj, kiuj partoprenis en la bulgara kontraŭfaŝisma ribelo en septembro 1923, sed la poemo respektas ankau la vivon de la lirika heroo, de la aŭtoro mem, lian lacigan kaj pezan laboron, lian klaran komprenon, ke la homo naskiĝis ne por esti sklavo, sed por esti libera kaj feliĉa.“

Sekvante la kreaĵojn de la poeto, la preleganto profunde analizis kelkajn aliajn rimarkindajn laŭ subjekto, poezia stilo kaj emocia forto verkojn. La versaĵoj „Patrino atendas“, „Septembra balado“ kaj „Tri militoj“, k.a. malkovras la civitanan kaj politikan engaĝiĝintecon de la poeto, kiu ekde sia junaĝo ĝis hodiaŭ estis ĉiam en la unuaj vicoj de la batalantoj por

socia justeco kaj homa feliĉo. Miĥalkov sukcesis prezenti la specifan lirikan verkmanieron de Ĥristo Gorov, la perfektecon de lia lingvo, lian ĉiam klaran kaj firman politikan pozicion.

Bonega ideo de la organizantoj de tiu poezia vespero estis ilustri la prelegon per deklamaj kaj muzikaj plenumoj laŭ verkoj de Ĥristo Gorov. Ili kreis vere lirikan poezian etoson. Versaĵojn recitis la geaktoroj el Bulgara Esperanto-Teatro Belka Beleva, Veneta Zjumbuleva, Ginka Toteva, Hrisula Garili (kun akompano de la violonistino Liljana Petkova). La komponaĵoj de la popola artisto Dimitŕ Petkov laŭ „En fremda lando“ plenumis nia operkantistino Maria Angelova, akompanate per fortepiano de Ljudmila Bobanova. La junaj esperantistinoj el artgrupo „Serdika“ Albena Filĉeva, Kapka Miladinova, Elena Simeonova kaj Daniela Deneva inspirite recitis versaĵojn de Ĥr. Gorov.

Konklude Georgi Miĥalkov diris: „Ĥristo Gorov naskiĝis poeto kaj restas poeto. Malgraŭ ĉiuj okupoj, malgraŭ la streĉa laboro kiel prezidanto de nia asocio, li ne lasas la plumon. Siajn plej intimajn, plej ardajn pensojn li esprimas per poezio. La poezio estas lia vivbezono. Siajn poemojn li donacas al ni esperantistoj tiel simple kaj amike, kiel oni donacas florojn al siaj plej karaj amikoj. Ni ĉiuj, liaj legantoj, tutkore deziras, ke la poezia bukedo de Ĥristo Gorov estu ĉiam freŝa kaj buntkolora.“

Per korvarmaj vortoj la poeto dankis al la preleganto, al plenumantoj kaj al la ĉeestantaj esperantistoj pro ilia atento kaj estimo, pro la esprimita simpatio al lia poezia verkaro.

D. S. Ĥ.

NACIA LITERATURA KONKURSO

La Distrikta Estraro de BEA — Jambol, anoncas literaturan konkurson „Esperanto — fenestro al la mondo“ lige kun la 80-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio kaj la 100-jara jubileo de Esperanto.

Jurio konsistanta el reprezentantoj de CE de BEA pritaksos la verkojn. La plej bonaj estos premiitaj.

Originala rakonto:

I premio — 100 lv

II premio — 80 lv

III premio — 50 lv

Traduka rakonto:

I premio — 80 lv

II premio — 50 lv

III premio — 40 lv.

La literatura konkurso estas malkaŝa (publika). En ĝi povas partopreni aŭtoroj kaj tradukemuloj el tuta Bulgario. La verkojn, tajpitajn en tri ekzempleroj, oni devas sendi ĝis la 30-a de januaro 1987 (validas la poŝta stampo) al adreso: DE de BEA, Jambol 8600, poŝtkodo 25.

FRUKTODONA INTERNACIA SEMINARIO

La VII Internacian Seminarion, organizitan de Bulgara Esperanto-Junularo en la Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica) de la 29-a de septembro ĝis la 5-a de oktobro j.k. partoprenis 40 aktivuloj el ok landoj: Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Greklando, Hispanio, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando. Tiuj junaj esperantistoj kolektiĝis por pridiskuti la temon „100 jarojn Esperanto“. La jubileo de la Internacia Lingvo estas konvena okazo por ke la pli junaj E-generacioj rememoru ĝian historion kaj preparolu la nunan staton kaj estontan disvolvigon de la junulara E-movado. Tiuj tri elementoj: pasinteco, nuntempo kaj estonto



Interesaj prelegoj kaptis la atenton de la partoprenantoj en la Internacia Junulara Seminario

Foto: la aŭtorino.

estis la bazo de la seminarioj prelegoj, ĉiam vigle pridiskutataj. Jen la pli gravaj kontribuoj al la programo: „La doktrino de d-ro Zamenhof“ (Jaroslav Parzyszek — prezidanto de Pola Studenta Esperanto-Komitato ĉe la Asocio de Polaj Studentoj kaj estrarano de TEJO pri aktivula trejnado); „Specifaj trajtoj de la E-propagando en la junulara medio“ (Ljubomir Trifonovski — estrarano de Bulgara Esperanto-Junularo), „La nuna junulara E-agado en GDR (Detlev Kraus —

prezidanto de GDREJ), „La junaj esperantistoj en Greklando (Kostas Zaharakis — estrarano de HEA kaj respondeculo pri junulara agado), „La taskoj de la junulara E-movado en Ĉeĥoslovakio (Zdenek Mrkvička — vicprezidanto de CEJ kaj Milan Ondruš — prezidanto de JES), „Ideaj aspektoj de la junulara esperantista movado“ (Jan Koszmaluk — ĝenerala sekretario de TEJO kaj estrarano de Pola Studenta Esperanto-Komitato — PSEK), „Historio de la kataluna junulara E-movado“ (Héctor Alós i Font — prezidanto de KEJ), „La vojo al nova organiza strukturo de la Junulara Sekcio ĉe Hungara Esperanto-Asocio“ (László Szilvási — prezidanto de HEJ kaj Jozef Madaras — sekretario de HEJ), „E-teatro kaj dramo en Pollando kaj la esperantista junulara kultura agado“ (Leszek Lewandowski — estrarano de PSEK), „La junulara sekcio ĉe BEA — aktivado kaj taskoj“ (Cvetka Miteva — prezidantino de BEJ kaj Mariana Elenova — vicprezidantino de BEJ), „Internacia brigadana somero“ 86 de junaj esperantistoj en Bulgario“ (Elena Stojkova — prezidantino de DE de BEA en Burgas kaj Bistra Dojčinova — instruiciistino pri instrulaboro de DE de BEA — Sofio), „La agado de la junaj esperantistoj en Jugoslavio“ (Senad Čolić — ano de la Prezidentaro de JEL kaj Stjepan Lovrinović — prezidanto de junulara E-klubo en Zenica).

Estis prezentitaj ankoraŭ du interesaj prelegoj fare de Jan Koszmaluk — „La agado de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj „Jubileaj preparoj“ de Jaroslav Parzyszek, kiu estas samtempe vicprezidanto de LKK de la 43-a IJK en Krakovo kaj ano de LKK de la 72-a UK en Varsovio.

La laborprogramo estis sufiĉe streĉa, ĉar krom la antaŭviditaj prelegoj kaj pridiskutoj pri la ĉefa temo, estis organizita ankaŭ neformala kunveno de la TEJO-komitatoj, gvidata de Jan Koszmaluk. Li informis pri la kunsido de TEJO-estraro, okazinta en la periodo 7-10.09.1986 en Rastatt (FRG). Enkadre de la seminario oni okazigis ankaŭ kunsidon, dum kiu la landaj reprezentantoj reciproke sin informis pri la regiona agado. Okazis ankaŭ laborkunsido de la junularaj sekcioj el la socialismaj landoj kaj renkontiĝo de komitatoj de BEJ.

Estis pridiskutata la ebleco, ke venontjare la seminario okazu sub la aŭspicio de TEJO.

En tiu informo mi ne parolos detale pri la distra programo, ĉar ĝeĵunuloj (des pli esperantistoj!) ĉiam sukcesas krei gajan amuzan etoson. Mi nur ŝatus mencii la unutagan ekskurson al la distrikta centro — Smoljan, al ripozejo Pamporovo, al la Smoljan-lagoj, kaj al vilaĝo Široka Laka kun tipe rodopa arkitekturo.

Prognozoj kaj esperoj

Dum la VII Internacia Junulara Seminario, eĉ en liberaj de prelegoj horoj, oni vaste pridiskutis diversajn problemojn de la junulara E-movado. Dum la interparoloj naskiĝis la ideo pri tiu enketo, kiu tuŝas demandojn pri la estonteco de Esperanto kaj pri disvolviĝo de la E-movado.

— *Via opinio pri la seminario?*

Jan Koszmaluk — ĝenerala sekretario de TEJO:

— Por mi estis tre interese partopreni la seminarion, i.a. ĉar mi havas ampleksajn sciojn pri la aktivado de la

E-junularo en Orienta Eŭropo. Dank' al gastama BEJ, kiu certigis tre bonajn laborkondiĉojn, la seminario estis bona okazo por ĉiuj partoprenantoj spertiĝi en la sfero de aktivula trejnado. Mi kredas, ke la prelegoj prezentitaj en Pisanica kaj la viglaj diskutoj pli riĉigis la primovadan informigon de la partoprenantoj, inkluzive la mian. Mi speciale ĝojas, ke la arangon ĉeestis dekdu komitatoj de TEJO, kiuj aktive kontribuis al la laborprogramo. La seminario estis ankaŭ okazo por diskutoj pri diversaj aferoj de TEJO-agado, kion mi taksas tre alte. Mi dankas al BEJ pro la okazigo de tiu valora arango, kiu helpis nian junularan Esperanto-movadon.

László Szilvási — prezidanto de Hungara Esperanto-Junularo:

— De jaro al jaro la seminario disvolviĝas kaj estiĝas pli populara, ĝia nivelo plialtiĝas. Dum la aranĝo la reprezentantoj de socialismaj landoj ankaŭ havis eblecon konsidi laŭ la rekomendoj de la ĉi-jara Konsultigo de Esperanto-organizo el la socialismaj landoj en Poprad. La teknika flanko de la seminario ankaŭ estis bona. Eĉ ni hungaroj iomete envias al la bulgaraj esperantistoj pro la ebleco disponi pri tiu bazo en Pisanica. Bedaŭrinde, mi partoprenas la seminarion eble lastfoje, ĉar mi atingas la aĝon, kiam mi devas lasi la junularan Esperanto-movadon. Sed mi estas kontenta pri la seminario kaj eble venontjare mi partoprenos ĝin private.

Kostas Zaharakis — estraro de Helena Esperanto-Asocio kaj respondeculo pri junulara agado:

— La seminario pasis multe pli bone ol mi atendis. Mi estas kontenta pri la laborprogramo. Bona kaj amuza programo!

Hèctor Alòs i Font — prezidanto de la Kataluna Esperanto-Junularo:

— Dum la seminario estis prezentitaj pluraj riĉenhavaj kaj interesaj prelegoj. Mi multon eksciis pri la agado de la landaj junularaj sekcioj, kies reprezentantoj partoprenis la aranĝon.

— *Via opinio pri la nuntempa junulara Esperantista movado? Vicj pregnantaj pri ĝia evoluo?*

Jan Koszmaluk:

— TEJO havas aktivulojn en pli ol 50 landoj. La aktiveco de la E-junularo dependas de pluraj faktoroj. Ne ĉie, kie ekzistas realaj eblecoj krei landan sektion de TEJO, tio okazas. TEJO havas 25 junularajn organizaĵojn — la t.n. landaj sekcioj. En proksima estonteco oni atendas plimultiĝon de la nombro de landaj sekcioj. Mi pensas pri Ameriko kaj Malproksima Oriento. Mi opinias, ke TEJO devas pli multe atenti pri la aktivecojn en Afriko. La situacio en Eŭropo estas ĝenerale pozitiva. Pluraj junularaj esperantistaj organizaĵoj preparigas por la celebrado de nia 100-jara jubileo. Specifa trajto de la junulara movado estas la relative mallonga aktivadperiodo de la junaj homoj. Mi volas atentigi: ĉar la TEJO-junularo aktivadas 5—10 jarojn, TEJO mem devas ĝustatempe zorgi pri preparo de novaj aktivuloj sur internacia nivelo ĉe la landaj sekcioj kaj aliaj kunlaboraj junularaj E-grupoj. Por atingi tion, necesas estonte plibonigi la landan agadon kaj turni pli da atento al aktivula trejnado. Mia persona opinio estas, ke ankaŭ UEA devas doni pli da efektiva apogo al la TEJO-iniciatoj.

László Szilvási:

— Ne nur la esperantista junulara movado, sed la junulara movado ĝenerale estas ne tiel vigla kaj aktiva kiel dum la 60-70-aj jaroj. Se nia movado havas realajn celojn, ĝi disvolviĝos kaj estiĝos tia, kian ni mem faros ĝin.

Kostas Zaharakis:

— Dum la internaciaj junularaj kongresoj la atmosfero estas agrabila, sed oni devas serĉi manierojn por okupi kaj pensigi ĉiujn partoprenantojn. La movado prosperos kaj mi esperas, ke ne nur nombre. Ni deziras kredi, ke pli da esperantistoj plialtiĝos. Finfine mi diros: „Ne lasu la homojn dormi“.

Hèctor Alòs i Font:

— Ĉi-tie mi konstatis ian influon inter du generacioj de junularaj E-aktivuloj. Mi sentas, ke mi apartenas al la ne nur pli juna, sed iomete pli nova generacio. Sajne ni, ĝiaj reprezentantoj, estas malpli filozofemaj kaj parolemaj kompare kun la TEJO-aktivuloj, kiuj nun estas sur la pinto de la internacia junulara movado. En multaj landoj la porsesanta agado de junuloj denove iom post iom revigligas — ekzemple — en Bulgario, Hungario k. a.

— *La perspektivoj de Esperanto?*

Jan Koszmaluk:

— Mia persona opinio estas, ke la Esperanto-fenomeno estas granda humanisma valoro, pri kio ja estas konvinkitaj multaj el la plej bonaj reprezentantoj de la homaro. Mi opinias, ke ni devas direkti nian agadon al forpelo de mitoj kaj legendoj pri ni — tio okazu paralele kun la ordinara ĉiutaga aplikado de Esperanto en ĉiuj sferoj de la nuntempa vivo.

László Szilvási:

— Eble Esperanto trovos sian lokon en la ĉiutaga homa praktiko, sed ni devas turni nian atenton al aplikado de Esperanto en la ekonomia sfero. Se la Internacia Lingvo trovos sian lokon tie, antaŭ ĝi estos hela estonteco, ĉar Esperanto estiĝos necesa kaj utila.

Kostas Zaharakis:

— Mi volas esperi, ke eblas sukceso de la celoj de Esperanto — disvastiĝo kaj enkonduko serve al la homa interkompreniĝo.

Hèctor Alòs i Font:

— Mi kredas, ke la Esperanto-movado disvolviĝos en direkto al la faka agado kaj pli da fakuloj uzos ĝin en sia profesia laboro paralele kun la aliaj lingvoj.

**Maria JANKOVA,
sekretario de Bulgara
Esperanto-Junularo**

PIF'86

Ankaŭ ĉi-jare, fine de aŭgusto, la teatroj en Zagrebo kaj en kelkaj najbaraj urboj estiĝis gastigantoj de la Pupteatra Internacia Festivalo (PIF). La tradicia intereso al tiu kultura aranĝo kunvenigis pupteatrojn el Pollando kaj Francio, el Japanio, el Italio kaj Jugoslavio.

La bulgara sekcio de UNIMA (Internacia organizaĵo de pupteatroj) decidis la partoprenon de la Ŝtata Pupteatro el Silistra kun la spektaklo „Vidu kiom simple estas“ de Veselin Anev. Reĝisoro estas la aŭtoro mem, scenografo Maja Petrova. La tradukon en Esperanto kaj la lingvan preparlaboron faris B. Beleva. Esperanto-kurson gvidis Slavka Obreškova.

La teatraĵeto traktas la problemon pri infanaj interrilatoj, pri bono kaj malbono.

Mirko kaj la Kokcinelo — la centraj herooj, donacis al la krea kolektivo du premiojn — de la infana ĵurio kaj de la lingva ĵurio.

En ĵurnalo „Ponedjeljak“ („Lundo“), 25. VIII. 1986, sur p. 8 oni povas legi: „... La spektaklo estas realigita sur alta profesia nivelo, kun klara eduka direkto... per belaj pupoj kaj altkvalita animado.“

En la Televido de Zagrebo, kiu filmis la spektaklon, ĝi ankaŭ ricevis bonan pritakson fore de profesianoj. Do dum la ĉi-jara PIF oni daŭrigis la sukcesplenan partoprenon de la Bulgara Pupteatro.

La festivalon partoprenis ses bulgaraj infanoj — junaj esperantistoj. Antoaneta Petrova, lernantino en sesa klaso, informis nin per letero: „... La multenfojn mi partoprenas tiun festivalon kaj mi multe emociiĝis... Fortan impreson faris al mi la infanoj — ili estas ĝojaj kaj feliĉaj... Plej multe plaĉis al mi la bulgara enscenigo. La ludo de la aktoroj estis tre bela... Mi volas, ke sur la tero estu eterna paco, estu tiaj festivaloj...“

La organizantoj de PIF — la Zagrebaj esperantistoj, jam komencis la preparon de la jubilea dudekjara sesio de PIF, kiu koincidas kun la jubilea jaro de Esperanto — 1987.

Belka BELEVA

Nia konstanta kunlaboranto Canko Murgin afable disponigis al ni recenzojn pri tri antaŭnelonge aperintaj eldonoj de BEA, kiujn ni publikigis ĉi-sube.

LIBRO PRI LA BULGARA VIRINO

Rumjana Ganĉeva, Milanka Vilova, Nevjana Abaĝieva: 100 Demandoj kun Respondoj pri la Bulgara Virino. Tradukis: Nikola Aleksiev, eldonis Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1986, p. 139, 20, 1×14, 4 cm.

Tre interesa estas la historio de la bulgara feminisma movado. La unua loka societo de virinoj estis fondita en urbo Lom (1857) sub la nomo „Bonkoreco“. Tiam Bulgario ankoraŭ ĝemis sub la otomana jugo. La ideo pri eldono de tiu ĉi libro ĝermis el la konataj de la Komitato de la Movado de Bulgaraj Virinoj, aŭ koncize KMBV, kun eksterlandaj virinaj organizoj.

La triopo de aŭtorinoj formulis 100 demandojn kaj respondis al ĉiu el ili. Ĉiu demando kun respondo okupas meze iom pli ol paĝo. La demandoj (kun respondoj) estas klasitaj en 7 ĉapitroj. Kvankam la enhavo de tiu bela informo libro ŝajnas „fragmenta“, tamen fakte, en sia tuteco, ĝi desegnas kompletan bildon pri la historio, disvolvo kaj nuntempaj taskoj de la bulgara virina movado (p. 8-32), pri la klereco de la bulgara virino (p. 33-45), pri la profesioj kaj okupiteco (p. 47-79), pri la sociopolitika agado de la virinoj (p.

81-96), pri la familio (p. 97-122), pri la sociala rolo de la patro (p. 123-128) kaj ankoraŭ kelkaj demandoj (kun respondoj) de ĝenerala karaktero (p. 129-138).

Jen estas novaj facetoj pri la bulgara popolo kaj pri la nuntempa aspekto de socialisma Bulgario. Ni rekomendas tiun legindan kaj studindan verkon.

KONTRIBUO AL LA INTERNACIA JARO DE PACO

Aleksiev Nikola: Internacia Jaro de Paco. Recenzis (la manuskripton) Ĥristo Gorov. Redaktis Evĝeni Georgiev. Eldonis Bulgara Esperantista Asocio kaj Bulgara MEM-Komitato. Ofset-Presejo de BEA, Sofio 1986, formato 20,2×14,4 cm.

Post mallonga „Enkonduko“ (p. 3) sekvas la esenco de tiu ĉi verko, konsistanta el kvin aktualaj pacpolitikaj artikoloj, en kiuj la aŭtoro traktas sisteme la deĵorantajn problemojn de nia epoko: 1) Programo de la Internacia Jaro de Paco (p. 5-7); 2) La Internacia Jaro de Paco (p. 8-10); 3) La Plano „Gorbaĉov“ (p. 11-16); 4) La honestaj homoj agadas (p. 17-28); 5) La esperantistaro kaj la pacbatalo (p. 29-42).

En la fina parto, sub titolo „Aldonoj“, trovis lokon tri altvaloraj dokumentoj; a) Apelo de la partoprenantoj en la Internacia Renkontiĝo „Esperantistoj

VOŠIAKI MIZUNO

Raporto el Eŭropa Esperantujo

(Daŭrigo de n-ro 11/86)

BULGARIO Sofio

La 6-an de majo, je la 9-a horo vespere, mi atingis la centran stacidomon de Sofio. En la granda halo min atendis esperantistoj. Ili estis s-ro Donĉo Ĥitrov, ĉefredaktoro de la revuo „Bulgara Esperantisto“, s-ro Petko Bonev, pri kiu mi poste detale skribos, s-ro Atanas Dimitrov, mia sep-jara korespondanto, kiu pasis longan vojon por vidi min ĉe la stacio, kaj s-ro Angel Todorov, direktoro de la Internacia Esperanto-Kursejo.

En la hotelo ni kune diskutis pri la tagordo por ĉirkaŭ unu monato de mia restado en la lando. Mi miris aŭdi, ke en Bulgario preskaŭ seninterrompe okazas esperantaj aranĝoj dum la tuta jaro. Mi decidis partopreni en la Kongreso de IFEF (Internacia Federacio de Esperantistoj-Fervojistoj), kiu malfermiĝos la 12-an kaj fermiĝos la 18-an de majo en „Suna Bordo“ (Slanĉev Briag) apud la Nigra Maro. Kune kun Petko kaj Donĉo, mi gustumis bovan vespermangon en la restoracio de la hotelo.

La sekvan tagon, la 7-an de majo, min vizitis Petko Bonev. Li havas 62 jarojn, kaj laboras

kiel kemia inĝeniero. Li loĝas en urbo Stara Zagora, 300 kilometrojn for de Sofio kaj feris dum 20 tagoj por akompani min dum la tuta tempo tra la lando. Li estas tre bonkora homo, parolas Esperanton bone, kaj zorgis pri mi kvazaŭ mi estus lia malgranda filo.

Petko kondukis min al la loko de gazetara konferenco en iu hotelo. La konferenco celis propagandigi la Fervojistan Kongreson. Kunvenis ĉirkaŭ 50 ĵurnalistoj el 17 ĵurnaloj. Donĉo prezidis la kunvenon, kaj salutis s-ran Joachim Giesner el FRG, la prezidanton de IFEF kaj aliajn eminentulojn. Oni ankaŭ prezentis min kiel sola reprezentanto de Japanio en la Kongreso.

Posttagmeze de la sama tago mi promenis en la urbo kun Petko. Inter multaj vidindaĵoj, kiujn mi vizitis, la plej impona estis la Katedralo Aleksandr Nevskij. Ni ankaŭ supreniris per lifto al la pinto de monto Vitoŝa, de kiu oni havas belegan panoramon al la urbo Sofio.

Ni vespermangis iom lukse en la restoracio „Sakura“ de Hotelo Nova ŝtano, kie oni preparas japanajn manĝaĵojn. Bedaŭrinde, mi ne trovis nekuiritan freŝan fiŝaĵon, kiel Saŝimon kaj Suŝion, al kiuj mi jam sopiris post kvin semajnoj eke de mia forveturo el Japanio.

Mia amiko Petko, tamen esprimis kontentegon al japana manĝaĵo.

Sekvan matenon mi forlasis la hotelon kaj kun Petko vizitis la centran oficejon de Bulgara Esperantista Asocio. La Asocio okupas la parteran etaĝon de malgranda konstruaĵo, sed, laŭ mia impresio, funkcias tre vikle. Mi ankaŭ vizitis la oficejon de la Internacia Esperanto-Kursejo, iom fore de BEA. Min varmege akceptis la jam menciita Todorov kaj aliaj oficistoj. Mi aŭdis, ke en la pasinta jaro partoprenis en la Kursejo sep japanoj. Oni rekomendis al mi resti en Pisanica, la sidloko de IEK dum unu ĝis du semajnoj, pri kiu propono mi volonte konsentis.

Je la 4-a horo posttagmeze, mi forveturis el Sofio kun Petko, por viziti malgrandan vilaĝon Ljahovo, kie loĝas mia amiko Atanas jam menciita. Mi revenos al Sofio en la fino de majo, do tio estas nur provizora adiaŭo al la urbo.

Al mi ege plaĉis la bulgara ĉefurbo, kiun karakterizas kaŝtanarboj kaj tilioj. La atmosfero estas libera kaj la popolo estas pli homeca ol en iu ajn urbo, kiun mi jam vizitis.

Vilaĝo Ljahovo

La 8-an de majo mi forlasis Sofion kaj atingis la vilaĝon Ljahovo kune kun mia amiko Petko.

por la paco kaj malarmado" (p. 41—49), b) Mesaĝo de la Japana Sekcio de MEM al la Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj por Paco kaj Malarmado en Volgogrado (p. 42—44) kaj c) Deklaro de la Monda Pacokonsilio, en resumo, (p. 44—49).

Tiu ĉi broŝuro atestas pri la senlaca kaj verva partopreno de la aŭtoro en la laboro por vastigo kaj hardigo de la esperantista pacbatalantaro.

FRATECO KAJ SOLIDARECO

Aleksiev, Nikola: La Internaciismo de Ĥristo Botev kaj nia Nuntempo. Raporto antaŭ la Internacia Konferenco de Esperanto-Redaktoroj en Vraca, Bulgario (25—26-a de majo 1986). Redaktis Evgeni Georgiev. Eldonis Bulgara Esperantista Asocio, Ofset-Presejo de BEA. Sofio, 1986, p. 22, formato 20,2×14,4 cm.

En la kuranta jaro plenumiĝis 110 jaroj ekde la pereco de Ĥristo Botev en batalo kontraŭ la Otomana Imperio por la liberigo de Bulgario.

En tiu ĉi raporto la aŭtoro atentigas pri la ĵurnalisma verkaro de Ĥristo Botev. En „La Kredo de la Bulgara Komuno“ (1871. 04. 20) li en saluto al la Pariza Komuno formulis la principojn de la Bulgara Komuno (p. 12—13), defendas la Parizan Komunon en „Ridinda Ploro“ (1871. 06. 25) kaj pledas por „La Internacio“ (1875. 08. 03). Per ampleksaj citaĵoj el ĵurnalismaj prozverkoj de Ĥristo Botev N. Aleksiev ilustras sian tezon pri la internaciismo de la granda bulgara patrioto. Tiun verkon la esperantistaro bezonis kaj nun oni jam havas ĝin.

Ljaĥovo estas vere eta vilaĝo, kie loĝas mia longjara korespondanto Atanas Dimitrov, instruisto en mezlernejo, kiu parolas Esperanton flue. Mi restis du tagojn ĉi li, kaj dumtage lia filo Rumen veturigis nin al mond-konata ripozejo kun varmaj fontoj. Vespere, la sekvan tagon, mi ĉeestis la festan ceremonion de la Tago de Venko super Faŝisma Germanio.

Mi estis tre kontenta pri la gastigado de mia amiko. Li aranĝis por mia komforto ĉion laŭ lia povo.

Plovdiv

La 10-an de majo mia amiko Petko kondukis min al urbo Plovdiv — la dua plej granda urbo en la lando, kie mi vizitis la firmaon „Globus“. La firmao estas tre prospera. Inter ĝiaj eltrovaĵoj estas speciala „cigaredo“ „Antitab“. por helpi forlasi fumadon. Konsumante tiun pseŭdo-cigaredon dum certa tempodaŭro, oni povas tute liberigi sin de tiu malbona kutimo, diris la direktoro. Mi tuj provis ĝin, kaj la rezultato? Bedaŭrinde mi ankoraŭ fumas!...

Dank' al lia prizorgo, mi havis por mia gvidanto tra la urbo junan belulinon — Ganka Brajkova, kiu laboras ĉe la firmao kaj instruas Esperanton en lernejo kaj kursoj. Ŝi akompanis min al la ruinoj de teatro el la epoko de antikva Romo, ĉirkaŭ 2000 jarojn antaŭe. Mi ankoraŭ vizitis la Internacian Foiiron, en kiu partoprenis kelkaj japanaj firmaoj. Vespere, ni forlasis la

urbon.

Stara Zagora

Malfrue en la nokto de la 10-a de majo, mi alvenis al urbo Stara Zagora, kie loĝas mia amiko Petko. Lia edzino Viŝka, tro afabla virino, akceptis min varmkore. Kvan-kam ŝi ne parolis Esperanton, ŝi bone komprenas la signifon de la Internacia Lingvo, kaj helpas sian edzon Petko en lia agado por Esperanto.

La sekvan tagon, la 11-an de majo, mi veturis al urbo Kazanlāk, en kiu situas mondkonata fabriko por gitaroj — la firmao „Kremona“, kaj ankoraŭ la kompanio „Bulgara Rozo“, kiu produktas rozoleon kaj parfumojn.

Survoje hejmen, ni iom ripozis en la vilaĝo Māglij, kie nin akceptis tieaj esperantistoj, kaj oni regalis nin per unika bulgara kafo.

Reveninte, Viŝka rakontis al mi multe pri la historio de Bulgario, kiu estis sub la otomana jugo dum 500 jaroj, kaj nur en 1878 akiris liberecon kun la helpo de la rusa armeo.

Slanĉev Brjag

La 12-an de majo, posttagmeze, mi sekvis mian amikon Petko al la ejo de la 36-a Kongreso de IFEF (Internacia Federacio de Esperantistoj-Fervojistoj). Oni jam akceptis min en la Kongreso senpage kiel unu sola partoprenanto el Japanio. La Kongresejo situas en la marborda ripozejo „Slanĉev Brjag“ ĉe la Nigra Maro. La numero de mia kongreskarto estis 944. La sa-

MILDA FIFRO JAM EKSONIS

Bulgara ampeozio. Elektis kaj tradukis Ljuba Bojaĝieva. Redaktis: Nikola Pilev. Lingve reviziis: Lidia Raeva. Kovrilo: Diana Velkova. Eldonis: Bulgara Esperantista Asocio, 1986. Formato: 21×25 cm. Paĝoj: 58. Prezo: 0,40 lv.

Oni kun kontenteco povas konstati, ke tiu ĉi unua provo traduki en Esperanton la riĉan kaj belsonan bulgaran popolan ampeozion estas tre sukcesa. Ĝi estas plia pruvo, ke Esperanto kapablas transdoni ĉiujn, eĉ plej subtilajn nuancojn de penso kaj sentoj, sen fuŝi aŭ malvalorigi la perfektecon de la originalo. Nome en tio konsistis la malfacila tasko de la tradukinto. Oni devas emfazi ankaŭ la spertan intervenon de la redaktoro.

Estas malfacile diri, kiu el la prezentitaj en tiu kolekto 56 popolaj amkantoj estas plej bela. Ĉiu el ili respegulas la animriĉecon de la bulgaro, scipovinta tiel nature kaj senpretende elverŝi sian amon en melodaj versoj.

La libro estas bele presita, sur blanka bonkvalita papero. La trafaj kovrilo kaj titolpaĝo, pentritaj konforme al la bulgara folkloro stilo, aldone kontribuas por ĝia plaĉa aspekto. Oni povas nur bedaŭri, ke mankas ilustraĵoj al la teksto, aŭ almenaŭ vinjetoj, kiuj farus ankoraŭ pli alloga tiun malgrandan, sed riĉan havan verkon.

Do, ni danku la eldonintojn kaj bondeziru, ke multigu similaj interesaj kaj bonkvalitaj libroj en Esperantujo.

Nikola UZUNOV

man vesperon oni havis „Internacian Vesperon“, en kiu mi ekkonis multajn esperantistojn el diversaj landoj.

La 13-an de majo okazis solena malfermo je la 9-a horo matene. Persone ĉeestis kaj salutis la Ministraro de Transporto s-ro Vasil Canov kaj poste sekvis multaj salutoj de diverslandaj delegitoj. Laŭpete, mi ankoraŭ faris etan festparolon, reprezentante japanajn esperantistojn:

„Karaj gesamideanoj,

Estas granda honoro por mi saluti vin en la nomo de japanaj esperantistoj.

Profesie mi ne estas fervojisto, sed tamen kiel turisto mi rajtas nomi min „fervojisto“, ĉar mi vojaĝis preskaŭ la tutan vojon de Pekino tra Siberio ĝis Bulgario per fervojo. Mi amas fervojon, afablajn fervojistojn. Mi elkore dankas al vi pro via amikeca invito al la Kongreso kaj eĉ senpage!“

Eksplozidis ridego en la granda halo, kaj mia eta parolo ricevis aplaŭdojn.

Vespere mi ĉeestis la bankedon organizitan de la Ministro de Transporto kaj gustumis tre bonajn manĝaĵojn. Poste okazis Internacia Koncerto dum tri horoj, kie ludis kaj kantis unuarangaj artistoj el diversaj landoj.

Sekvan matenon mi renkontis ĵurnaliston el Radio Sofio, kiu petis min iom paroli por la bulgaraj aŭskultantoj. Mi parolis ĉirkaŭ 10 minutojn, pere de la traduko de Petko, pri miaj impresoj pri la bulgaraj lando kaj popolo. Responde al demandoj, mi ankoraŭ komentis

Niaj laborformoj

Dum la lasta jaro DE de BEA en Ĥaskovo sukcesis aktivigi la agadon en urboj Harmanli, Svilengrad, Maĝarovo kaj vilaĝo Uzunĝovo.

Dum la lernojaro 1985/86, post 10-jara ĉesigo ni restarigis la Esperanto-kursojn en Harmanli kaj Svilengrad. Tie pli ol 20 komencantoj ricevis atestilojn pri posedo de unua lingva grado kaj estiĝis membroj de la lokaj societoj.

Estas kelkaj antaŭkondiĉoj, dank' al kiuj ni atingis tiun sukceson.

DE de BEA subtenas konstantajn kontaktojn kun la societaj estraroj. Ankaŭ de la certigo de regula kaj bona ligo kun la lokaj partiaj kaj ŝtataj organoj dependas la sukcesa disvolviĝo de Esperanto. Tio estas antaŭ ĉio la fakoj pri popola klerigo kaj kulturo ĉe urbaj popolaj konsilantaroj, la Komsomolo, la Patrolanda Fronto k. a.

La kontaktojn flanke de DE de BEA subtenas per regulaj vizitoj en la urboj Georgi Idakiev, kiu estas bone konata en la distrikto kaj havas la nececan aŭtoritaton. Per lia helpo la civitana kurso en Harmanli funkciis en la konstruaĵo de la Urba Politeknika Gimnazio. Ankaŭ en la mezlernejo „Petăr Angelov“ en

Svilengrad funkciis kurso por civitanoj kaj lernantoj.

Alia faktoro pri atingitaj sukcesoj estas la fakto, ke DE de BEA certigis vojaĝantajn lektorojn en la loĝlokoj, kie mankas kursgvidantoj.

Ekzemple, dum la periodo de la 18-a de oktobro 1983 ĝis la 1-a de aprilo 1986, kiel vojaĝanta lektoro en Harmanli estis P. Stojanov, kiu dum la tuta periodo forestis eĉ ne unu fojon kaj ne ĉesigis la kurson malgraŭ la malbona vintra vetero. Tiamaniere li donis al la kursanoj bonan ekzemplon de persistado en la laboro.

Kiel vojaĝanta lektoro, la kurso en v. Uzunĝovo gvidis Maria Ŝinelova, sekretario de societo „Asen Zlatarov“ — Ĥaskovo. La rezultoj de tiu kurso ankaŭ estas kuraĝigaj.

Tre utilaj por la sukcesa laboro de la kurso en Harmanli estis la faritaj perleteraj kontaktoj kun esperantistoj el aliaj landoj. Tio aktivigis la gekursanojn.

Ne lastloke staras la postulo regule raporti pri la farita en ĉiu kurso laboro kaj pritaksi la rezultojn. Tiu cirkonstanco sendube igas la kursgvidantojn serĉi novajn formojn kaj metodojn por instruado kaj lernado de Esperanto.

Jen tiuj estas kelkaj gravaj faktoroj por aktivigo de la esperanta movado en nia distrikto.

Penjo STOJANOV,
vicprezidanto de DE de BEA
Ĥaskovo,

pri la devo de scienculoj por defendi la pacon kaj kontraŭstari nuklean vetermadon.

Mi ankaŭ partoprenis la eksperimentan kurson laŭ Ĉe-metodo. La instruisto sukcese gvidis la lernantojn en amuza atmosfero. La pasigitaj du tagoj en „Suna Bordo“ estis vere fruktoplaj.

R a z g r a d

La 14-an de majo mi forlasis la Nigran Maron per rapida ŝipo „Kometo“ kaj atingis la urbon Varna, kie okazis Universala E-Kongreso antaŭ kelkaj jaroj. Mi restis unu nokton en la hejmo de s-ro Bonjo Bonev, frato de mia amiko Petko. Oni kondukis min al la „Oraj Sabloj“, mondkonata mara ripozejo.

La sekvan tagon mi alvenis per trajno al la urbeto Razgrad, kie min akceptis la tieaj samideanoj. D-ro Ivan Kirčev, prezidanto de la Esperanto-klubo, varme salutis min kaj donis al mi valoran memoraĵon. Mi vespermanĝis kune kun dek esperantistoj en la restoracio de hotelo „Vulpa Valo“. Ŝajnis, ke Esperanto viglas en ĉiu angulo de Bulgario!...

G a b r o v o

Matene, f-ino Tonja Stefanova kun s-ino Milena gvidis min al la vilaĝo Loznica. Mi renkontigis kun la estroj de la vilaĝo kaj aŭdis pri la prospera situacio de ĝia ekonomio. Mi ankaŭ ĝuis bonan vinon en granda vinfabrika. Fakte en Bulgario abundas Esperantismo kaj bongusta vino.

Poste ges-roj Radev veturigis

min kaj Petkon longan vojon dum pli ol tri horoj. Survoje ni vizitis malnovan urbon Veliko Tŕrnovo kun ĝiaj antikvaj fortikaĵoj, ankaŭ la stratojn, kie oni praktikadas tradiciajn metiojn laŭ malnovtempa maniero! Malfrue posttagmeze ni finfine atingis urbon Gabrovo.

La 17-an de majo mi ĉirkaŭrigardis la urbon. Min akompanis s-ro Ĥristo Genčev, flua parolanto de Esperanto, kaj mi eniris la tre unikajn muzeon „Domo de Humuro kaj Satiro“, kiu famiĝas en la mondo pro sia grandskala ekspozicio. La etoso de gabrovaj humuraĵoj iom similas al tiuj de Skotlando. Ambaŭ temas pri eksterordinara ŝpavimo pro malriĉeco. Oni povas rimarki grandanimecon de gabrovanoj, kiuj vidas sin mem tute objektivite, kreante komikaĵojn el tragediaĵoj.

Post Gabrovo, ni revenis al Stara Zagora, kie mi ripozis tutan tagon.

P i s a n i c a

La 19-an de majo mi forveturis el Stara Zagora kaj kun malfacilaĵoj alvenis al la vilaĝo Pisanica malfrue vespere. La loko situas inter montoj kun verdaj arbaroj kaj tie troviĝas unu el la plej grandaj E-centroj — IEK (Internacia Esperanto-Kursejo). Per unu vorto, tiu estas la paradizo de esperantistoj. Ĉi tien venas multaj samideanoj el diversaj landoj de la mondo, inkluzive Japanion. La kursejo okupas larĝan terenon, sur kiu staras granda konstruaĵo. La tranoktejo havas pli ol 200 litojn por kursanoj, kun klasĉambroj, biblioteko, restoracio, bufedo, ktp. La kotizo

estas tre malalta, iom malpli ol 2000 jenoj en japana mono por unu tago — en duopa ĉambro, kun tri manĝaĵoj. Se plaĉas, oni povas restadi tie longan tempon, eĉ monatojn.

Bonega estas la medio: suno brilas, aero freŝas, abundas verdaĵo. Kiam mi vizitis IEK, plene floris ĉerizfloroj. Mi tuj promenis ĉirkaŭe, kaj vidis ondajn montetojn, verdajn kampojn kaj helan ĉielon.

Bedaŭrinde, dum la tagoj de mia restado oni ne havis kursojn. Sed tio, en iu senco, favoris min, ĉar mi povis havi mian tutan tempon por ĝui la naturon kaj konatiĝi kun multaj samideanoj. Inter miaj novaj amikoj troviĝis s-ino J. C.V. Veenendaal, nederlanda pensiulino, s-ro Veselin Damjanov, tre konata kantisto bulgara (jam forpasinta — *Noto de la Red.*), s-ro Julian L. Morales, maljuna hispana s-ino Halina Tadeusz, ingeniero el Pollando kaj aliaj.

De tempo al tempo oni faris etan ekskurson ekster la vilaĝo. Ekzemple, mi vidis geedziĝan feston en la apuda urbo Smoljan. Oni regalis min per vino kaj bongustaĵoj, estis muziko. Oni kantis kaj dancis en gaja etoso.

La 22-an de majo alvenis pola grupo de Esperantistoj-turistoj, entute 37 gejunuloj, kiuj planis resii en la kursejo tri tagojn por studi kaj ripozi.

Mi havis ŝancon aŭskulti la rakonton de f-ino Ani Dimitrova, tre kompetenta instruistino en Pisanica, pri la sistemo de edukado kaj ekzameniĝo fare de BEA (Bulgara Esperantista Asocio). Ŝajnis, ke ĉio estas bone aranĝita. En tiu lando Esperanto estas jam oficiale

Festo de IEK

Dum sia pli ol dekjara ekzistado la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica (IEK) estiĝis grava centro de E-instruado, kie okazas renkontiĝoj de esperantistoj el ĉiuj kontinentoj, diversaj naciaj kaj internaciaj arangoj. Ĉio ĉi famigis IEK en la medioj de la monda esperantistaro kaj inde vicigis ĝin inter aliaj similaj esperantistaj centroj — Grésillon en Francio, Chaux-de-Fonds en Svislando k. a.

Ankaŭ ĉi-jare — de la 2-a ĝis la 5-a de oktobro — okazis la jam tradicia Festo de IEK, kiun partoprenis multaj bulgaraj esperantistoj kaj gastoj el pli ol 10 landoj. La festo koincidis kun la okazigo de Internacia Junulara Seminario en Pisanica, kio donis al ĝi apartan junularan internacian etoson.

En solene ornamita salonego kolektiĝis pli ol 60 personoj el Belgio, Britio, Francio, Aŭstrio, Grekio, Hispanio, Hungario, Jugoslavio, Kanado, Bulgario, k. a. Speciale por la festo venis internacia grupo de „Monda Turismo“, gvidata de s-ro Andrzej Dziebowski, direktoro de turista oficejo „Esperantotur“ el Bidgosc, Pollando. La ekskursantoj partoprenis en la arangoj de Internacia Turisma Foiro en Pollando kaj survoje al Turkio, restis du tagojn en Pisanica.

La feston de IEK malfermis ties direktorino Maria Toleva, kiu korvarme salutis la gastojn. Emocie

salutparolis ankaŭ la vilaĝestro Georgi Nikiforov, kiu rakontis al la partoprenantoj pri la pli ol kvarcent-jara historio de Pisanica.

En siaj salutparoloj ing. Petăr Todorov, vicprezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, kaj ing. Angel Todorov, ĝenerala direktoro de IEK, subtekstis la grandajn sukcesojn de la kursejo kaj la specifan karakteron de la ĉi-jara „vojaĝanta simpozio“. A. Dziebowski informis, ke „Monda Turismo“ jam estas oficiale registrita en Belgio kiel oficejo por internacia turismo, kio multe kontribuas al la plua evoluo de E-turismo kaj al disvastiĝo de Esperanto en la internaciaj turismaj medioj.

Festparolis ankaŭ Kostas Zaharakis (Grekio), Maria Alvarez (Hispanio), Dragan Novaković (Kanado), Margit Eva (Hungario), Branko Vokić (Jugoslavio), Dickinson (Britio), k. a.

Estis traŭgigitaj saluttelegramoj el Britio, Usono, Belgio, Hispanio kaj el aliaj landoj.

Post la festa tagmanĝo oni projekciis filmojn pri turismo.

Dum la aferecaj renkontiĝoj, laŭ informo de ing. Angel Todorov, estis subskribitaj kontraktoj por kunlaborado kaj vojaĝoj tra Bulgario kaj eksterlande kun reprezentantoj de kelkaj alilandaj turistaj E-agentejoj.

La ĉi-jara Festo de IEK—Pisanica denove montris ĝian grandan popularecon en la mondo kaj ĝian kontribuon al la Esperanta kulturo.

IEK-Pisanica,
oktobro 1986

D. SIMEONOV

nstruata lingvo en lernejoj sub aŭspicio de la registaro, kaj do ne mirinda estas la elstara prospero de bulgara Esperantujo inter orient-eŭropaj landoj.

Mi havis ankoraŭ bonan ŝancon konatiĝi kun s-ro Nikola Uzunov kaj lia edzino, kiuj faris longan vojon al Pisanica por vidi min. Li estas fama instruisto de Ĉemetodo, kiu celas al pli efika instruado de Esperanto, nome „Esperanto per Esperanto“. Mi interŝanĝis opiniojn kun li koncerne la situacion de Esperanto-movado kaj -instruado en ambaŭ landoj. Post la vespermanĝo, Uzunov montris al ni kia estas la Ĉemetodo en ĝia praktikado, per unuhora leciono al komencantoj de pola turista grupo.

La 23-an de majo mi faris ekskurson al la Montopinto Snežanka kaj ĉirkaŭaĵoj. La monto estas internacie konata skiejo, sed ankaŭ en frua somero ĝi havas unikan ĉarmon.

La sekvan tagon mi forlasis Pisanica kun karaj rememoroj kaj revenis al la ĉefurbo Sofio kun Petko.

Sofio (ankoraŭfoje)

La 24-an de majo, mi atingis Sofion kun mia konstanta akompananto Petko. Oni jam aranĝis por mi bonan ĉambron en la hotelo „Hemus“ apud monto Vitoŝa.

Tiu ĉi tago hazarde koincidis kun granda festo en Bulgario, nomita „Tago de la Slava Alfabeto de Klerigo kaj Kulturo de Bulgario“. Oni feste memorigas la kreon de la slava alfabeto, ĉirkaŭ 1000 jarojn antaŭe, kaj okazigas grandan manifestacion en la centro de la urbo. Mi rigardis televidan elsendon de

tiu eventaĵo kaj havis impreson pri la profunda amo de la bulgara popolo al siaj lingvo kaj kulturo.

Mi intervjuis s-ran Dimităr Papazov, ĝenerala sekretario de Centra Estraro de BEA, en lia oficejo. Li estas juna kaj aspektas tre kompetenta organizisto. Al mia demando pro kio viglas la Esperanto-movado en Bulgario Papazov respondis jene:

„Unue, la Bulgara E-movado havas longan tradicion. Baldaŭ post la kreo de Esperanto, bulgaroj jam interesiĝis pri tiu lingvo pere de informoj en rusaj ĵurnaloj, kaj en 1889 estis fondita la unua Esperanto-Klubo en Sofio. BEA mem festis sian 75-an datrevenon antaŭ du jaroj. Kaj malgraŭ la malfacilaĵoj dum la mondmilitoj, la movado daŭre marŝas antaŭen. Nun ekzistas tutlanda organizo — BEA, kies membroj estas pli ol 9 000. Konsiderante la nombron de loĝantaro de tiu lando, ĉirkaŭ 8 000 000, la cifero gravas multe.“

„Due, oni havas grandan subtenon de la bulgara registaro. La plej elstara ekzemplo estas la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica kaj Varna, kiuj ege ŝuldas al la financa helpo de la ŝtato.“

„Trie, kia estas la rilato inter la registaro kaj Esperanto-movado en Bulgario? Mallonge, la ŝtato atendas, ke BEA plialtigu la kulturen nivelon de la popolo pere de Esperanto, kaj BEA, siaflanke, respondas al tiu atendo per siaj klopodoj disvastigi la Internacian Lingvon kaj konatiĝi ĝian idealon inter la popolo kaj samtempe plibonigi la kvaliton de la movado.“

Vespere de la sama tago, mi sidis en la „Infana Teatro“ en la cent-

ro de la urbo. Tie mi plezure rigardis Esperantan dramon — „La Milionulo“. Tiu dramo prezentiĝis kiel la unua parto de la programo „Tagoj de Esperanta Kulturo“. Okaze de la tutlanda festo de bulgara kulturo, jam menciita, esperantistoj planis propagandi al la popolo pri la alta kultura valoro kaj utileco de Esperanto.

La dramo ege impresis min. Facile kompreneble kaj nature fluas Esperanto, ankaŭ la aktorado estis perfekta kaj lertega. „Bulgara Esperanto-Teatro“ estis fondita en 1958 kaj ĝis nun ĝi partoprenis multfoje en Universaliaj Kongresoj de Esperanto. Verdire, mi ankoraŭ ne havis sperton ricevi egan impreson je la prezentado de esperanta dramo de Japanio. Ĉu pro la manko de mia kapableco aprezi, aŭ pro la maller-teco de la aktoroj, sed tamen nun mi vidis propraokule, ke Esperanto taŭgas por dramo kaj povas esti amuziga.

Post la teatraĵo mi akompanis mian amikon Petko al la stacidomo.

Jam li devis reveni hejmen por eklabori. La 20 tagoj, kiujn mi pasigis kun li, ŝajnis al mi nur plezura sonĝo. Li vere sindone zorgis pri mi. Kaj de sia flanko li postulis nenian kompenson por la laboroj, kiujn li faris por mi. Kiam mi esprimadis mian dankemon, li ĉiam diris al mi: „Tio estas mia devo kaj plezuro. Estu trankvila!“ Kaj nun li forveturis al sia hejmo en la urbo Stara Zagora.

Rigardante la forveturantan trajnon, mi ne povis reteni profundan emocion en mia koro.

(Daŭrigota)

INTERNACIA ESPERANTO-KVIZO



La ĵurio objektive pritaksis la respondojn de la partoprenantoj en la Internacia E-Kvizo

Kiel dommastro de la ĉi-jara XIX Nacia Revuo de Esperanto-Kanto kaj Parolo, DE de BEA — Razgrad, elmontris sian kapblon de bona organizanto, prezentis siajn esperigajn kaj ĝojigajn atingojn en la disvastiĝo de Esperanto.

La ambiciaj esperantistoj el tiu ĉi dum la lastaj jaroj eksplodmaniere evoluanta regiono de nia lando ne kontentigis per la ĝis nun atingitaj rezultoj. Pruvo pri tio estas la Internacia Esperanto-Kvizo (dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj al la Internacia Jaro de la Paco — 1986) okazinta la 6-an kaj la 7-an de oktobro j. k. Inicijintoj kaj organizantoj de tiu aranĝo estis DE de BEA kaj la distrikta organizaĵo de la Bulgara Asocio pri Turismo kaj Feriado en Razgrad (BATF). Tiun ĉi unikan en nia lando distran E-aranĝon partoprenis multaj bulgaraj kaj fremdlandaj esperantistoj. Partoprenantoj kaj gastoj estis loĝigitaj en la belega kaj moderna turista hotela komplekso „Razgrad“ — unu el la plej altaj konstruaĵoj en la urbo, situanta sur monteto, de kie ĝi superregas la tutan urbon.

La 6-an de oktobro posttagmeze en la fum-salonoj de hotelo „Razgrad“ okazis la solena inaŭguro de du interesaj ekspozicioj — „ikebana“¹ kaj verkoj de junaj pentristoj el Razgrad. La aŭtorino de la ekspozicio pri „ikebana“, Tonja Stefanova — sekretario de DE de BEA, montris altan majstrecon en tiu ne kutima por nia lando arto, kiun ŝi ekposedis helpe de sia instruistino-japanino.

La saman posttagmezon en la belega konferencsalono de la hotelo, sub la sperta gvido

de Donĉo Hitrov, ĉefredaktoro de „Bugara Esperantisto“, okazis gazetara konferenco pri temo „Esperanto kaj turismo — instrumentoj por paca komunikigo kaj amikiĝo de la popoloj“. La konferencon partoprenis pli ol 30 ĵurnalistoj el la ĉefurbaj kaj lokaj ĵurnaloj, el la radio kaj televido.

Abundaj informmaterialoj estis disponigitaj al la ĉeestantoj, ĉar la organizita kvizo kaj la problemoj pri aplikado de Esperanto en turismo vekis grandan intereson, la ĵurnalistoj starigis multajn demandojn.

La kvizo okazis la 7-an de oktobro, je la 9-a horo en la Video-klubejo de hotelo „Razgrad“ — en tri etapoj, pri ses ĉefaj temoj: „Ĉu vi konas Bulgarion?“, „Geografio de Bulgario“, „Vivo kaj agado de Georgi Dimitrov“, „Ĉu vi konas urbon Razgrad?“, „Turismo“, „Pacdefendo“. La ĵurion konsistigis d-ro Ivan Kirĉev, inĝ. Petăr Todorov kaj s-ro Kostas Zaharakis el Grekio. La fremdlandajn teamojn gvidis: Monique Caestecker (Belgio), Maria Alvarez (Hispanio), Tomislav Jolić (Jugoslavio), Elizabeth Pálos (Hungario). La teamon de urbo Razgrad (nur 17-jaraj knabinoj-gimnazianinoj) gvidis Stojanka Dobрева, tiun de IEK-Pisanica — inĝ. Vladimir Dermenĝiev. La programon gvidis Nevena Krăsteva el Sofio. Gvidantino de la kvizo estis Dobrinka Zagorova, kiu disponigis la kovertojn kun la demandoj por ĉiu aparta etapo.

La por unua fojo organizita en nia lando Internacia Esperanto-Kvizo estis sukcesa. Tamen kelkaj rimarkigoj kaj bondeziroj ne estas superflujaj: pli frua dissendado de invitiloj eksterlanden, por ke la internacia partopreno estu pli multnombra; pli korekta kaj belsona Esperanto-elparolado; pli bona lingvo-posedo ĝenerale kaj pli frua diskonigo de la temaro al la dezirantoj partopreni en la Kvizo.

La du ĉefajn premiojn — de Bulgara Esperantista Asocio — dektaga feriado en IEK-Pisanica kaj de BATF — dusemajna feriado en hotelo „International“ en la ĉamara restadejo „Zlatni Pjasaĉi“ apud Varna — gajnis la teamoj de Razgrad kaj de Belgio. Monique Caestecker ricevis ankaŭ la specialan premion de IEK por altnivela lingvoposedo. La tria premio estis aljuĝita al la teamo de Jugoslavio. Dua premio ne estis donita. La premion de la Distrikta Komitato de Komsomolo en Razgrad por plej juna teamo kaj bona sinprezento gajnis la knabinoj el Razgrad. La ceteraj partoprenantoj ricevis kuraĝigajn premiojn.

Konklude ni dezirus adresi laŭdajn vortojn al D-ro Ivan Kirčev, Dobrinka Zagorova, Tonia Stefanova, Dimo Dimov, Nedka Djulgerova, Hristo Dimitrov, kiuj sindone preparis tiun unikan, emocian kaj distran E-aranĝon,

esperante, ke ĝi denove ripetigos sur ankoraŭ pli bona organiza kaj lingva nivelo.

Radi BANČEVSKI

„Ikebana“ — specife japana maniero arte aranĝi florojn (Noto de la Red.)

IMPRESOJ KAJ BONDEZIROJ

Post partopreno en la Internacia Esperanto-Kvizo, nia kunlaboranto Radi Bančevski interparolis kun iuj el la fremdlandaj gastoj. Ĉi-sube ni donas lokon al liaj „dumvojaj“ intervjuoj.

MARIA-ELVIRA ALVAREZ (Hispanio):

— Unuan fojon mi vizitis Bulgarijon en 1984, lige kun la kongreso de IFEF. Miaj impresoj pri la lando kaj pri la homoj estis bonegaj! Bulgario multe similas al mia loĝregiono Galerio en la plej nordokcidenta parto de mia lando — montaroj, arbaroj, malgrandaj vilaĝoj, bonkoraj homoj. . .

Laŭ speciala invito mi partoprenis la Feston de la Internacia Esperanto-Kursejo kaj mi ĝuis la belaĵojn de la ĉirkaŭa naturo, la gastamon de la dommastroj. Mia opinio, la kunlaborantojn en la kursejo oni devas oficigi per konkurso — laŭ ilia lingvokono.

La kvizo en Razgrad donis al mi fortajn emociojn kaj multajn novajn konojn. Tio estis bonege organizita aranĝo kaj mi proponos similan iniciaton en Hispanio lige kun nia venontjara Esperanto-kongreso.

MONIQUE CAESTECKER (Belgio):

— En Bulgario mi estas por dua fojo kaj denove mirigas min la moderna, tute ne ori-

enta maniero de konstruado; estas io tre specife bulgara — eble tiu kunvivado de tre malnovaj, bone konservitaj domoj kun la novkonstruataj loĝdomegoj, la perfekta kunvivado de romiaj kaj aliaj antikvaj postrestaĵoj kun la moderna kaj la tipe bulgara arkitekturo. En Razgrad mi denove konstatis la samon — en la urbocentro staras grandega bela moskejo kaj vid-al-vide, sur la monteto — belega moderna hotelo. Kontrastoj, sed tamen harmoniantaj inter si! . . .

Bedaŭrinde, malmultaj personoj bone regas Esperanton, kaj tio malebligas senperajn kontaktojn. La zorgo pri plialtigo de la lingvokonoj kaj pri ĉiutaga praktikado de Esperanto devas esti konstanta.

ELIZABETH PÁLOS (Hungario):

— La kvizo estis bone organizita. Tamen la organizantoj devus pli zorgeme prepari la teamojn (speciale la alilandajn), ĉar ni ne estis preparitaj pri la starigitaj demandoj, ne konis Razgrad.

Mi rekomendus, ke la dato de la kvizo estu adaptita al la periodo de kursoj en Pisanica kaj post la fino de IEK-kursoj la partoprenantoj veturu al Razgrad. Sed pri tiu ĉi ebleco oni devas monatojn anticipe anonci kaj diskonigi la temojn.



Inĝ. Petăr Todorov salutas la gajnintojn

En la muzeo de László Nagy

La partoprenantoj en la ĉi-jara Konstanta Internacia Kvalifikejo (KIK) estis revenantaj de ekskurso al Aguşev-konak (unika mezepoka kastelo en vilaĝo Mogilica, ĉe la suda bulgara landlimo). Survoje la aŭtobuso haltis en Rajkovo, kvartalo de Smoljan. La ekskursgvidantino Maria Ivanova demandis: „Ĉu iuj el vi scias, ke en Rajkovo estas domo-muzeo de la fama hungara poeto László Nagy?” Iuj el la bulgaroj jesis, sed por niaj hungaraj amikoj tio estis vera surprizo. La rektoro de KIK, d-ro Árpád Mathé, ĉefredaktoro de „Budapeŝta Informilo“, esprimis deziron viziti la muzeon. Ankaŭ la ceteraj aliĝis al lia propono.

Baldaŭ ni estis sur strato László Nagy n-ro 4, antaŭ bela duetaĝa domo en tipa rodopa arkitektura stilo. Evidentiĝis, ke nia simpatia ĉiĉerono Maria devenas el tiu regiono kaj, fininte la superan klerecon (rusa filologio), ŝi dum kelka tempo laboris en tiu ĉi muzeo.

„Inter 1949—1952 László Nagy studis bulgaran filologion en la Sofia Universitato — ŝi diris. — Dum sia studado li konatiĝis kun multaj eminentaj bulgaraj verkistoj kaj poetoj. Liaj intimaj amikoj estis la poeto Ljubomir Levčev (nun prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj) kaj la verkisto Stanislav Sivriev. László Nagy tradukis pli ol 12 mil versojn el la bulgara en hungaran lingvon, bonege konis la bulgaran literaturon, amis Bulgarian. . . Kiu, fakte, estis László Nagy? Talenta pentristo-grafikisto — aŭtoro de multaj originalaj grafikaĵoj-ilustraĵoj de verkoj de hungaraj kaj alilandaj poetoj kaj verkistoj, kiel ekzemple Thomas Dillon. Lia edzino Margit Szécsi estis ankaŭ poetino. Li plurfoje vizitadis Bulgarian. Unuan fojon László Nagy vizitis Smoljan kaj Rodopi-montaron en 1976, akompanate de Stanislav Sivriev. En tiu sama jaro L. Nagy estiĝis laŭreato de la Internacia Literatura Premio „Hristo Botev“. Tutan semajnon L. Nagy kaj St. Sivriev gastis al siaj novaj amikoj en Smoljan, kie bolis vigla kultura agado. Li vizitis la vidindaĵojn en la regiono, konatiĝis kun ĝia historio kaj nuntempo, ĝuis la belaĵojn de Rodopi-montaro. L. Nagy estis proklamita „Honora civitano“ de Smoljan, sekve de kio li rajtis havi propran domon en la urbo. En tiu ĉi domo en kvartalo Rajkovo, kie li restis dum certa tempo, li komencis verki sian „Rodopan Taglibron“ — poemoj-impresoj, kiujn li intencis eldoni en aparta volumo. L. Nagy havis la ideon veni kaj loĝi ĉi tien, sed pro grava malsano li forpasas en 1978. Aŭtoro de la bareliefo sur la fronta muro de la Domo-muzeo estas la eminenta hungara skulptisto Janos Oros“ — finis sian rakonton Maria.

D-ro Mathé sciigis interesan detalon: versaĵoj de L. Nagy estas tradukitaj ankaŭ en Esperanton. La tradukojn faris Kolomano Kalocsay, Imre Szábo, k.a.

Kun respekto kaj estimo al la memoro de László Nagy ni eniris la muzeon. Tie ĉi en specialaj vitrinoj estas aranĝitaj manuskriptoj, vortaroj, tradukoj, fotoj. Unu el la ĉambroj estas meblita en rodopa stilo, kiel gastĉambro, kaj estas konservita tia kia ĝi estis antaŭ 10 jaroj. En alia ĉambro estas modesta ekspozicio de grafikaĵoj, ilustraĵoj — verkoj de la poeto kaj de lia edzino. Sur la muro pendas la Premio Kosuth — alta distingo de la hungara ŝtato por László Nagy.

En multaj ilustraĵoj de Nagy impresas figuroj de ĉevaloj, de multaj ĉevaloj, kiuj estis por la poeto simbolo de la libereco.

Ni esperas, ke ankaŭ aliaj esperantistoj-hungaroj kaj alilandanoj vizitos la domon-muzeon de László Nagy — granda kaj fidela amiko de Bulgario.

Rajkovo-Smoljan,
septembro, 1986

Dončo HÍTROV
Georgi MIHALKOV

LÁSZLÓ NAGY (1925-1978) estas unu el la plej signifaj reprezentantoj de la poeta generacio, debutinta tuj post la liberiĝo elsub faŝismo en 1945. Liajn unuajn poemarojn karakterizas la optimismo, propra al la unuaj postmilitaj jaroj, sed influis ilin ankaŭ la literatura skemismo de la personkulta periodo. Inter 1949 kaj 1952 li studus en Bulgario. Post la reveno lia poezio profundiga, ĝia temaro pligravigas. Tre multe lin inspiris la poemoj de Attila József, la bulgara popola poezio kaj la liriko de Federico Garcia Lorca: tio ŝuldiĝas al lia vasta tradukista agado. Dum la lastaj du jardekoj la temoj el privata kaj publika vivo plene kunplektiĝis en liaj poemoj. Lia poezio, konsistanta el diamante duraj kaj diamante brilaj versoj, prikantantaj la eternan homan sopiradon al feliĉo, estas unu el la kulminoj de la hungara liriko.

Ĉi-sube ni proponas al la atento de niaj legantoj en E-traduko du poemojn de László Nagy — „Kiu transportos la Amon“ kaj „Himno en ĉiuj tempoj, kiujn ni represas el „Hungara Antologio“ (eldono de HEA, 1983. Redaktis Vilmos Benczik).

LÁSZLÓ NAGY

KIU TRANSPORTOS LA AMON

Se mia vivo fine foros,
gril-ĉirpon kiu plu adoros?
Kiu al prugno flamon spiros,
al ĉielark' sin streĉe tiroj?
Rok-koksojn per brakumoj ploraj
kiu sorĉos terbuloj molaj?
Kiu lulos per karesaro
la murojn kun vejnet' kaj haro?
El blasfemar' al kredoj tretaj
ĉu iĝos katedraloj pretaj?
Se mia vivo fine foros,
vulturon peli kiu volos!
Kiu en dentoj mol-tenere
la Amon portos trariveri!

Tradukis: Péter András Rados

HIMNO EN ĈIUJ TEMPOJ

Ho vi, ĉielarkbrovulin',
sunlumidin' de flama sun',
fajlil' diamanta de lancfin',
vi, delic' mia, min helpu!

Paŝtist' de najtingala ĥor',
liutisto de tagmeza or',
palac' unua el marmor',
vi, delic' mia, min helpu!

Daktil' en valo de mizer',
pentraĵe kaŝridet-mister',
kupolo ora de preĝej',
vi, delic' mia, min helpu!

Gajni vipata kurĉeval',
standardon en ribelbatal',
stel' gvata tra prizona bar',
vi, delic' mia, min helpu!

Doktor' de vundoj de milit',
hejmo de senpatrujigit',
miela vino, dolĉa mit',
vi, delic' mia, min helpu!

Dormemulin' de vendohal',
dancisto de mizero-bal',
silvestro-nokta kornfanfar',
vi, delic' mia, min helpu!

En bela-radiaroj trema,
multkapajn idojn forjetema,
markrestojn brubatan rema,
vi, delic' mia, min helpu!

Ĉiam konata, sen sekret',
benata per esper-graved',
per die forta ĉarm'-posed',
vi, delic' mia, min helpu!

Min de eterne brakprenanta,
kun mi kusenon sin klinanta,
kornikojn kadavrigi kanta,
vi, delic' mia, min helpu!

Se de horor' min kaptas sven',
se min ablekas senhontem',
se mi batalas kun mi mem,
vi, delic' mia, min helpu!

Se rajto, ĝi 'stas mia prav',
ĉiu potenco — mia hav',
mi armas min per kasko, glav',
vi, delic' mia, min helpu!

Mia kortego brilfajreras,
la sango, fulgo glorfieras,
kolomboj miaŝultre kveras,
se, delic' mia, vi helpas.

Tradukis: Kálmán Kalocsay

ESPERANTO EN LA NACIA BIBLIOTEKO

Pri malfermo de E-kurso en la Nacia Biblioteko „Kjiril i Metodij“ en Sofio klopodojn oni faris ankaŭ antaŭe, sed tiu ideo nur nun realiĝis.

Laŭ iniciato de Urba Estraro de BEA la 16-an de oktobro j. k. en la Nacia Biblioteko estis solene inaŭgurita kurso de Esperanto. Ĉeestis Petăr Todorov — vicprezidanto de BEA, d-rino Cveta Stamenova — prezidantino de Sofia Urba Estraro de BEA, Dončo Hitrov — ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, Maria Dimitrova — vicprezidantino de Sofia UE de BEA kaj respondeculino pri instrulaboro kaj reprezentantoj de la Junulara Sekcio de BEA.

Petăr Todorov, d-rino Stamenova, Dončo Hitrov kaj Maria Dimitrova parolis pri la evoluo de Esperanto kaj pri la eblecoj starigi kontaktojn kun eksterlandaj muzeoj kaj bibliotekoj por utila reciproka kunlaborado, kiujn la Internacia Lingvo donas al bibliotekistoj.

La kurson de Esperanto gvidos Dimităr Dimitrov — stpendiulo de BEA en la Sofia Universitato.

Deziron vizitadi la kurson esprimis pli ol 20 kunlaborantoj el diversaj fakoj de la Nacia Biblioteko ĉar en ĝiaj tenejoj troviĝas granda nombro da esperantaĵoj — bulgaraj kaj alilandaj, kio jam estas antaŭkondiĉo por kreo de aparta fako de Esperanta literaturo.

Eble iun tagon al la nomaro de fakaj sekcioj ĉe BEA aliĝos ankaŭ sekcio de muzeaj kaj bibliotekaj kunlaborantoj.

R. B.

IN MEMORIAM

Nia neforgesebla Katja...



La 3-an de oktobro j. k. forpasis la konata esperantistino-pentristino Katja Maneva. Ŝi naskiĝis la 24-an de novembro 1911 en urbo Stanke Dimitrov en la familio de inteligentaj gepatroj. K. Maneva finis gimnazion kaj poste la Belartan Akademion en Sofio.

Ekde sia junaĝo ŝi komencis labori kiel pentristino kaj ĝis la lasta vivotago ŝi okupiĝis pri sia amata arto.

En 1960 ŝi komencis lerni la internacian lingvon Esperanto kaj aliĝis al nia movado.

Ŝi estis membro de Bulgara Esperantista Asocio — E-societo „Kosta Penev“, kaj individua membro de UEA. Krome, ŝi membris en Bulgara Esperantista Kooperativo, en la turisma organizaĵo „Monda Turismo“, en la societo de esperantistoj-filatelistoj, en la virina komisiono ĉe BEA.

Kiel membro de la iama ĉefurba societo „Maksim Gorkij“ ŝi legis informojn kaj ofte faris eldirojn pri diversaj temoj aŭ rakontis siajn impresojn, partoprenis en multaj E-kongresoj, konferencoj, renkontiĝoj k. a. Ŝi vigle korespondis kun multaj bulgaraj kaj kun pli ol 70 eksterlandaj esperantistoj.

Ĝis la fino de sia vivo Katja Maneva laboris por la disvolviĝo kaj prospero de la Internacia Lingvo.

N. ĈIPLAKOVA

ADIAŬ, KATJA!...

Niaj amikaj rilatoj datigas de miaj plej junaj aktoraj jaroj, kiam mi renkontis virinon sveltan, fajnman, intelligentan, talentan pentristinon, kun kiu mi interparolis pri belarto, pri teatro. . .

Post jaroj komenciĝis nia komuna agado en societo „M. Gorkij“ en Sofio — organizado de ĉiusemajnaj kulturaj programoj, preparo de diverstemaj artikoloj, rakontoj pri fremdaj landoj kun lumbildoj. . .

Poste sekvis la partopreno de Katja en la Virina Komisiono ĉe BEA — kun ŝiaj ideoj pri pluraj demandoj, kun ŝia preteco pri plenumo de diversaj taskoj.

Katja senmortigis siajn impresojn pri diversaj E-eventoj per belarto. Ŝi ŝatis veturi! Ŝi aktive partoprenis esperantistajn iniciatojn en la lando mem kaj eksterlande. Kaj de ĉie ŝi alportis impresojn, kiuj ekvivis sur ŝiaj bildoj. Per ŝiaj ekspozicioj ŝi ornamis kongresojn kaj E-festojn.

En nia domo restos ŝia kortuŝa donaco, signo de atento al ni: bildo prezentanta belajn florojn en vazo. Kaj la rememoro pri homo etika kaj agrabla, pri esperantistino sindona.

Belka BELEVA
prezidantino de la Virina Komisiono ĉe BEA

Kun amo al Bulgario

Miaj gekorespondantoj Figueroa el Meksiko proponis al mi ekkorespondi kun ilia amikino Celina Guerra. Belgino, esperantistino de la infanago, gravuristino sur metalo, ŝi laboris kune kun sia frato ĝis la tago, kiam renkontis sian korespondamikon el Meksikio — unu el la unuaj esperantistoj en tiu lando kaj ili decidis geedziĝi kaj vivi en la patrujo de la edzo.

Celina baldaŭ fariĝis unu el miaj plej ŝatataj korespondantinoj, nun jam 73-jara vidvino, ŝi vivas sola en Cuernavaca, sed pense estas kune kun siaj multnombraj gekorespondantoj-esperantistoj.

Al la redakcio de „BE“ mi proponas por publikigo eltrovaĵojn el ŝiaj leteroj, kiuj laŭ mi estas interesaj ankaŭ por la legantoj.

Maria P. ANGELOVA — Sofio

19.03.1985 — „Kara Marija, ... Dum la milito mi estis en Belgio. ... Mi treege admiris Dimitrov pro lia kuraĝa sinteno dum la proceso en Lejpcigo, pro bruligo de la Reichstag en Germanio!“

5.11.1985 — „... Jes, mi kaj ankaŭ mia frato tre estimas Dimitrov. ... Mi legis ĉiujn raportojn, kiam li estis malliberigita en Germanio, kaj mi admiras la forton kaj la pasion, per kiuj li defendis sin kaj siajn du amikojn. Certe estas, ke pro ilia kuraĝa sindefendo Hitler estis devigita liberigi ilin. La Dua Mondmilito eksplodis. ... Kaj jen oni preparas la Trian. Ĝis nun ĝi ne eksplodis pro la granda pacaktivado de Sovetunio. ...

Antaŭ nelonge mi legis libron pri la historio de Latin-Ameriko kaj ĝiaj famaj batalantoj pro sendependeco kaj libero. ... Norda Ameriko ĉiam ekspluatis tiujn landojn, kie regas nur mizero kaj suferoj. Mi niam pensis, ke Usono akceptos la nunan situacion en Nikaragvo Hodiaŭ post la diktaturo de Somosa, en tiu lando estas demokratia regado.

19. 06. 1986. Tre emocia estas por mi la sciigo, ke oni en Soifo havas lernejon „Benito Juarez“. ... Li estis granda patrioto kaj li batalis por la sendependeco de respubliko Meksikio. ... Lia fama eldiro: „La respekto al la rajto de la aliaj, estas la paco en la mondo“ — estas unu slogano por ĉiuj demokratiaj homoj. Estas bedaŭrinde, ke ne multaj nacioj sekvas tiun konsilon. ... eĉ inter individuoj tiu eldiro de Juarez povus evitigi multe da kvereloj kaj malagrablaĵoj!

Post ega varmo, ni nun havas pluvegojn. ... Mi estas kontenta, sed en la eksteraj malriĉaj kvartaloj de Meksikio, kie ankoraŭ mankas pavimitaj stratoj, kanalizacio. ... Pro la inundo multaj malriĉuloj perdus ĉion, kion ili havis. Eĉ en la domoj la akvo altiĝis ĝis unu metro. ...

Mi tre dankas vin pro la bildkarto kun la argentaĵoj el vilaĝo Rogozen. Ili estas arte faritaj kaj oni devas admiri la fakton, ke antaŭ 2400 jaroj jam estis tre efikaj instrumentoj por prilabori tiujn belajn vazojn. Tre interese estus, se oni povus esplori kiu aŭ kiuj estis la posedantoj, kiamaniere la trezoro venis en tiun ĝardenon. ... kaj kiel gratulinda estas la konduto de tiuj homoj, kiuj transdonis al la ŝtato la trovaĵojn kaj ne intencis komerci per ĝi. ...

Mi nun pensas pri mia frato Li ĉeestis E-kongreson en Bulgario. Li estis tiel feliĉa de tiu vojaĝo! ... Mi ankaŭ rememoras, ke kiam mi estis tre juna, mi havis korespondanton el Plovdiv. ... Estas bedaŭrinde, ke oni ne povas scii pri la vivo de ĉiuj iamaj gemikoj! Tre kore vin salutas — Celina!“

Enlanda movado

KOMENCIGIS LA NOVA LERNOJARO

SOFIO. Laŭtradicie ĉiujare en septembro la Urba Estraro de BEA okazigas pedagogiajn konsultigojn, kies ĉeftemo estis plibonigo de la instrulaboro kaj disvastigo de Esperanto en la urbo. En la ĉi-jara konsultigo partoprenis instruistoj de Esperanto en lernejoj kaj kursoj, respondeculoj pri instrulaboro ĉe la urbaj societoj kaj membroj de la Instrukomisiono ĉe UE de BEA.

La arangon ĉeestis la merita instruistino Maria Paŝova, kiu reprezentis la Cefurban Konsilantaron de Instruista Asocio kaj reprezentantoj de CE de BEA kaj de DE de BEA — Sofio.

Raporton pri la instrulaboro dum la pasinta lernojaro kaj pri antaŭstarantaj problemoj faris M. Dimitrova — vicprezidantino de UE de BEA, respondeca pri la instrulaboro. La elstara lektoro K. Vălev prelegis pri iuj metodikaj tendencoj en la instruado de Esperanto.

Post la eldiroj al la instruistoj kaj kursgvidantoj estis disdonitaj instruhelpiloj kaj propagandmaterialoj.

L. MANDALOVA,
metodikistino ĉe UE de BEA

PLEVEN. La 2-an de oktobro ĉi-jare en la E-klubejo sur str. „Canko Cerkovski“ 14 — estis solene malfermita la nova lernojaro. Al la personoj sukcese finintaj la E-kursojn dum la lernojaro 1985/86 estis disdonitaj atestiloj.

Dum la kuranta lernojaro E-kursoj por civitanoj funkcias en la E-klubejo en Pleven kaj en la klubejoj de la esperantistaj societoj en la distrikto. En ĉiuj mezlernejoj estas organizitaj grupoj por fakultativa lernado de la lingvo.

Dum la solenaĵo la prezidantino de DE de BEA Vălka Dobрева rakontis siajn impresojn pri la 71-a UK en Pekino.

Jorĵeta KAMENOPOLSKA

PORINSTRUISTAJ KURSOJ

La 1-an de aŭgusto 1986 en la aŭditorio de Centra Instituto por Perfektigo de Instruistoj en Sofio okazis malfermo de la senpagaj 20-tagaĵ kursoj por profesiaj instruistoj.

La kursanoj estis vizititaj de la ĝenerala sekretario de BEA Dimităr Papazov, kiu interesiĝis pri la organiza kaj instrua stato de la kursoj kaj parolis pri la ĵus finiĝinta 71-a UK en Pekino.

Por la ekzameno la kursanoj dum la lastaj tagoj streĉe sin preparis. ... Tamen la rezultoj ne estis sufiĉe bonaj pro la fakto, ke multaj el ili venis el siaj distriktoj kun konoj sub la minimumo, kiun ili devis ricevi en la antaŭe lernita grado. Ĉiuj estis firme konvinkitaj, ke ili devas daŭre studi la lingvon en la sekvaj „ŝtupoj“ kaj pretigi sin kiel bonaj kaj lertaj instruistoj de Esperanto.

Eva BOJAĜIEVA

INTERESA EKSURSO

Antaŭ tri monatoj DE de BEA en Kjustendil organizis ekskurson, dediĉitan al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj al la Internacia Jaro de la Paco. Partoprenis esperantistoj el Kjustendil kaj Stanke Dimitrov. Ili vizitis la belajn historiajn urbojn Loveĉ, Gabrovo, Veliko Tărnovo kaj Pleven.

Svetozar MATEV

La 30-an de septembro j. k. en la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco okazis „Vespero de la Paco“ — komuna aranĝo de BEA, la Bulgara Komitato pri Pacdefendo kaj la administracio de la Domo.

Partoprenis multaj esperantistoj el la sofia urba organizaĵo kaj membroj de la Sofia Pacdefenda Komitato. Gastis Galina Voskresenskaja kaj Ljubov Belkina el Moskvo, anoj de la Pacdefenda Organizaĵo.

En amika etoso la gastoj dividis sperton pri la diversaj manieroj de pachtalo en Sovetunio kaj kun intereso aŭskultis la rakontojn de la dommastroj.

La vespero finiĝis per nelonga belarta programo, preparita de la Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „M. Gorkij“.

V. B.

DANKON, HUNGARAJ AMIKOJ!

En 1985 esperantistoj el societo „Julio Baghy“ en urbo Kiŝkunfelegihaza gastis al membroj de nia E-societo „Diĉo Petrov“ en urbo Ĉepelare. La konatigo elkreskis en amikecon kaj ĉi-jare ni vizitis Hungarion. Niaj travivaĵoj en la frata lando restas neforgeblaj.

Dafinka ĈERNEVA,
Nikolina TAKOVA



ARGENTINO

Atilio Orellana Rojas — 5000 CORDOBA, Casilla de Correo 1428 — pri arto, legendoj, dancoj de diversaj landoj; kolektas kalendaretojn; BK, PM, kasedojn, monerojn, popolajn metiartaĵojn.

BULGARIO

Geesperantistoj el Razgrad deziras korespondi pri ĉt. kun ĉl.: Stojanka Dobрева (17-jara) — Razgrad, ul. „Stranga“ 54; Diana Jotova (17-jara) — Razgrad, j. k. „Orel“ bl. A, vh. 8, ap. 17; Milena Dačeva (17-jara) — Razgrad, ul. „Babuna“ 57; Svetla Petrova (17-jara) — Razgrad, j. k. „Orel“ bl. G, vh. 1, ap. 18; Rumen Kalev (20-jara) — Razgrad, j. k. „Orel“ bl. MVR, vh. B; Rozina Slavova (24-jara) — Razgrad, j. k. „Orel“ bl. 1—2, ap. 21; Svetla Savova (21-jara) — Razgrad, ul. „P. Volov“ 8; Svetla Vasileva (18-jara) — Razgrad, Srednoŝkolsko obŝtejtie ap. 56.

FRANCIO

Max Lainé — 72470 Champagné, „Bellevue“ — kun bulgaraj geesperantistoj.

LIDIA RAEVA. Plenkunsido pri E-Instruado . . .	11
DIMITAR PAPAŖOV. Unua raporto . . .	1
JORDAN KALINOV. Imitinda vivo . . .	3
CANKO MURGIN. Debuto kaj fino de Volapuko en Bulgario (1886—1986) . . .	4
* ** Poezia vespero . . .	5
MARIA JANKOVA. Fruktodona internacia seminario . . .	6
BELKA BELEVA. PIF'86 . . .	7
NI RECENZAS . . .	8—9
YOSHIAKI MIZUNO. Raporto el Eŭropa Esperantujo . . .	8—11
D. SIMEONOV. Festo de IEK . . .	10
PENJO STOJANOV. Niaj laborformoj . . .	11
RADI BANČEVSKI. Internacia Esperanto-kvizo . . .	12
DONČO HITROV, GEORGI MIHALKOV. En la muzeo de László Nagy. . .	14
IN MEMORIAM. Nia neforgesebla Katja . . .	15
LETEROJ DE KORESPONDAMIKOJ . . .	16
ENLANDA MOVADO. . .	1
DEZIRAS KORESPONDI . . .	1
VERDAJ STELETOJ . . .	

Sur la unua kovrilpaĝo:

Ankaŭ vintre IEK en Pisanica aspektas ĉarme kaj alloge.

ALVOKO AL KUNLABORO

Por ke Voĉo de Handikapuloj ne estu plorkolektanto, nur helpkrio de malavantaguloj, ni petas ĉiujn verkemajn homojn, kiuj havas intereson por handikapuloj kaj handikapulojn mem kunlabori en nia gazeto. Ĝi deziras pritrakti jenajn temojn el pluraj vidpunktoj.

1. Diferenco inter denaska kaj poste trafita handikapiteco

2. Handikapita korpo kaj kreaĵo potenco

3. Handikapulo — sana homo

4. Socio, medicino, ekonomio kaj handikapitaj homoj

5. Esperanto — handikapuloj

Viaj kontribuajoj pri supraj temoj devas esti ne longaj, paĝoj tajpitaj kun innerspaco kaj margeno, en bona lingvo. La materialon bv. sendi al adreso: Voĉo de Handikapuloj, red. Dušan Adnadaj, Školska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

Noto: La jarabono inkluzive membrokotizon estas 5 Usonoj dolaroj aŭ egalvaloro. Pagojn bv. direkti al supra adreso.

IRANO

Naĝid Gafari — (17-jara) — Tabriz 51436, Sarbaz shahid st. — Bage safa — Hassan abad. 25 — pri sporto, medicino.

VJETNAMIO

Than Kjm Vjet (22-jara) — u. Nhatkang — Phú Khánh, 06 Hoang Hoa Tham — kun bulgaraj geamikoj.

Ĉefredaktoro: Dončo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAČEV, Mariana ELENVA, Dimitar HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIHALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARIA ESPERANTISTO“

Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

VERDAJ STELETOJ



RUZA PETRO — VILAGESTRO

de Angel KARALIJEV

Kolektigis la vilaĝanoj el la vilaĝo de Ruza Petro sur la placo por elekti vilaĝestron. Iris tien ankaŭ Ruza Petro. Li surmetis sian novan kalpakon, ĉar li sciis ke estas homoj, kiuj juĝas pri la homo laŭ lia kalpako, ne laŭ la menso. Jen alvenis ankaŭ la vilaĝa ĉorbagio kun granda ventro, kun longa pipo kaj rozario enmane.

— He, Petro, tiu ĉi kalpako, kiun vi surmetis, similas al ĉorbagia. Nu, donu ĝin al mi, por ke mi vidu ĝin!

Ruza Petro donis al li sian kalpakon. La ĉorbagio prenis ĝin kaj, por ridigi la vilaĝanojn, frape jetis teren la kalpakon.

— Nu, homoj-vilaĝanoj, mi provu ĉu ĝi forte tondras!

Ruza Petro kliniĝis, prenis sian kalpakon de sur la tero, purigis ĝin per skuado kaj diris:

— Aŭskultu, homoj-vilaĝanoj, mi volas rakonti al vi fabelon!

La vilaĝanoj sciis, ke li povas sprite rakonti kaj tuj ĉirkaŭis lin. Ruza Petro komencis:

— Vi ja aŭdis pri la hebrea reĝo Salomono. Oni diras, ke li scipovis diveni la pasintecon de la homoj, aŭguri la estontecon kaj komprenis la lingvon de ĉiu vivanta estaĵo. Foje Salomono invitis en sian ĝardenon ĉiujn bestojn: leonojn, ursojn, lupojn, leporojn, cervojn, bubalojn, ĉevalojn kaj azenojn. Vi demandas kial li invitis ilin? Ja li komprenis iliajn lingvojn, do li deziris aŭskulti iliajn interparolojn kaj iom amuziĝi, ĉar ili parolis inter si pri tre ridindaj aferoj.

Unu post la alia venis ĉiuj. Fine venis ankaŭ la azeno. Vidinte tiom multe da bestoj en unu loko, ĝi streĉis la orelojn, ekstaris antaŭ Salomono kaj komencis bleki tuforte. Ĉiuj bestoj interrigardis unu la alian kaj Salomono ŝtopis la orelojn. Kiam la azeno eksilentis, la leono alproksimiĝis al ĝi kaj demandis:

— He, kion vi faras?

— Mi blekas — respondis la azeno.

— Kial vi blekas?

— Ja, se mi ne montros mian azenaĵon antaŭ tia granda kunveno — respondis la azeno, kie mi montros ĝin?

— Jen estas la fabelo — finis Ruza Petro, — ĉu vi komprenis ĝin?

— Ni bone komprenis ĝin — ekridegis la kamparanoj.

La vilaĝa ĉorbagio ŝtele foriris. Tiam la vilaĝanoj elektis kiel vilaĝestron Ruzan Petron.

¹Ruza Petro — heroo de la bulgara folkloro.

²Ĉorbagio — en tiu ĉi kunteksto — riĉulo.

MIĤAIL ŜEKERĜIEV

TURISTINO

Knabineto estas mi, jes, knabineto, sed Patrujon mian amas mi kun flamo. Sur la montoj, kun la agloj kreskas mi libere, konas ŝtormojn, ventojn kaj belecon konas mi. Amas mi Balkanmontaron la hajdutan, la kristalajn, purajn, blujajn lagojn. Tie, kie partizana sango dum ribelo fluis, ŝatas mi papavojn ruĝajn kolektadi. Scias mi Vapcarov kie maturiĝis — en la sino de Pirinmontaro roka, Botev kie por la libereco batalis, kie por popolo sklava nia sinofere falis. Vejen, Vihren, Bogdanmontojn venkis mi en suno kaj nebuloj, sur Persenk mi kriis „Ehooo!“ Ruen estis en glaciaj dornoj, kiam ĝin mi grimpis vintre. Eh vi ŝtormoj, ventoj, sunaj spacoj, hardu vi en mi fortegan karakteron, por ke homo bela, brava mi estigu, ke sindone mi konstruu komunismon. Knabineto estas mi, jes, knabineto, sed animo mia flamas jam en amo, amas mi la sunon, amas la vastecon, portas mi la ĝermon de la nova vivo.

Anekdotoj

— Paĉjo, mi petas, veturigu min al la lernejo.
— Sed mi veturos en alia direkto.
— Des pli bone!

— Panjo, la barometro falas abrupte...
— Kiom strange, kion ĝi montras nun?
— Mi ne scias... Mi ellasis ĝin de la balkono sur la straton.

— Mi volas aĉeti kontrabason por mia filo.
— Kiom aĝa li estas?
— Okjaraĝa.
— En tia aĝo estas pli bone por li ludi fifron.
— Ho, ne! Li havis fifron kaj hieraŭ li englutis ĝin.

— Mi komencis iri en la aĝo de dek monatoj! — fanfaronas iu knabino antaŭ sia amikino.
— Ha, ĉu tio estas tiom miriga? Mi komencis iri ankoraŭ pli frue, sed mi ne diris pri tio al miaj gepatroj, tial ili portis min en siaj brakoj tutajn du jarojn.

Iu patrino petas la filinon:
— Nu, formangu vian supon. Ja vi scias kio okazas al knabinoj, kiuj ne nutras sin bone!
— Mi scias, ili fariĝas manekenoj.

— Paĉjo, ĉu vi timas la leporojn?
— Ne!
— Do, kial vi kunprenas la hundon kaj la paŝilon, kiam vi iras ĉasi leporon?

El la bulgara: Dimităr HAĜIEV

Esperantigis: Dimităr HAĜIEV